





Aŭstralazio, 1589



Esperanto sub la Suda Kruco

Septembro-Oktobro 2000
Numero 47 (vol. 8, no. 5)

ISSN 1039-9380



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 47 (volumo 8, numero 5), Septembro-Oktobro 2000

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte:

libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo: Mapo pri la Pacifiko kaj Amerikoj, desegnita de Abraham Ortelius en 1589. Ĉi tiu estas, laŭdire, la unua eldonita mapo pri la Pacifiko.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Ĉu adverba? (M. Leereveld)	9
La birdinsulo Isla Rasas (S. Zaft) ..	10
Ĥristo Metev (B. Felby)	12
NZEA kunveno/kongreso 2001	13
Sciuj: vi devus halti se... (G.L Arosjev)	13
Diversaĵoj	13
Niaj legantoj skribas	
Trevor Steele, Maurício Borges ..	16
Zoran Popovic	17
For la gramatikon! (M. Leereveld) .	18
El la regionoj	19
Diskuto pri Raŭmo	
Mark Fettes	20
Ralph Harry	23
Marcel Leereveld)	24
Jubileo de Antarktika Esperanto- Asocio (Odlo Bokserp)	26

Recenzoj:

<i>Surklifa</i>	
recenzas Donald Broadribb	3
<i>Australian & New Zealand Esperanto Dictionary</i>	
recenzas Vera Payne	3
recenzas Marcel Leereveld	4

English Supplement

ESK estas legebla per la Interreto:
<http://www.poboxes.com/esk>

Network: esk

Limdato por artikoloj por la novembra numero: 20 oktobro.

RECENZOJ

SURKLIFA

Recenzas Donald Broadribb

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Serĝo Elgo: *Surklifa*. Eldonis: Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno, 2000. 210p., fortike broŝurita. Originala romano.

Ĉi tiu estas rimarkinde interesa romano de rimarkinda verk talentulo. Ĝis nun la pseŭdonomo Serĝo Elgo (lia vera nomo estas Georges Lagrande) ne multe rolas en nia literaturo, sed ĉi tiu romano pruvas ke li nepre meritas lokon, nu, se ne apud Trevor Steele, tamen tre proksime.

Surklifa estas dektektiv-romano, kvankam la detektivo, Inspektoro Kramer, rolas nur kiel preteksto por reliefigi la verajn ĉefrolantojn en la romano. Efektive, li detektas nenion — eĉ ne estas certe ĉu estas io detektinda, ĝis la plejlastaj paĝoj de la romano kiam troviĝas respondo.

Surklifa estas tre trafa priskribo de aro da rolantoj, ĉiu havas propran karakteron, neniu el ili estas kliŝa kartonaĵo. Leginte la libron, oni sentas koni plurajn tre verajn personojn, oni konas la internon de ilia psiko, iliajn emojn, iliajn timojn, iliajn idiosinkraziojn. Estas malfacile kredi ke ili estas nur imagaĵoj venintaj el la menso de la aŭtoro. Nepre ili ja ekzistis, ĉu ne? —

Nu, verŝajne ne. Sed la aŭtoro scias tre bone kredi ke ili estas realaj.

Teme, la romano unue aspektas relative simpla:

Okazas aŭtoakcidento, iu ne-tre-grav-ulo mortas.

Ĉar la detaloj de la evento estas tre malklaraj, la polico devas rutine enketi.

Kio plej impresas estas ke la aŭto-

akcidento identiĝas kun tia akcidento en precize la sama loko antaŭ kelka tempo. Ĉu nur hazarde? Se ne, do kial ne?

La unua mortinto estis la unua edzo de la relative juna virino Anna, kiu nun estas la edzino de la posedanto de *Surklifa*, eleganta domo kiu situas sur alta klifo. La vojo de tiu domo al la publika ŝoseo estas tre malbonstata privata vojo, kaj la veturigintoj de la aŭtoj ŝajne perdis regon de la aŭtoj, la aŭtoj veturis trans la randon de la klifo, eksplodis, mortis la veturigantoj. La unua mortinto estis la edzo de Anna. La dua estis vizitinta Annan.

Eble ŝi povas informi ĉu la vizitinto tro drinkis, ĉu li estis moroza, distrita, aŭ ĉu eble li simple trorapide veturigis sur la ĝiroplena¹ vojo?

Anna povas nenian utilan informon doni. Ŝia aktuala edzo tradormis la tutan eventon, do ankaŭ li nenion scias. Kelkaj klaĉuloj en najbara vilaĝo volonte donas detalojn, plejparte (aŭ eble tute?) elpensitajn.

Ni ankaŭ renkontas la fraton de Anna, Ivan, kiu ege malsimilas al ŝi aspekte. Ĉu eble li kaj lia fratino amoradis, kaj temas pri incesto? La respondo estas interesa. La klaĉemuloj en la vilaĝo ankaŭ estas bone priskribitaj. Ni legas pri unu el ili tre detale, viro kromnomata Belkrura (ĉar li perdis ambaŭ kruojn, kompreneble). Li fascinas inspektoron Kramer, kaj ankaŭ nin. Ankaŭ lian animon ni profunde ekkonas.

Sufiĉe pri la temo de la romano. Por vere koni ĝin, necesas legi la romanon. Tio estos plezuriga por vi, ĉar ĝi rangas inter la dek plej bonaj originalaj romanoj de nia Esperanta literaturo. Do legu, kaj ĝuu. [El Monato]

¹ Lots of twists and turns.

AUSTRALIAN & NEW ZEALAND ESPERANTO DICTIONARY

recenzas Vera Payne

Takso: $\frac{1}{2}$

Ralph Harry & Brian Fox: *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary*. Eldonis: Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, 2000. 98p., broŝ. Prezo: Aŭ\$8, NZ\$10.

KIA ORA, karaj legantoj.

Jen Aŭstralia kaj Nov-Zelanda suplemento al Esperanto-vortaroj. En 1983 Ralph Harry redaktis la unuan eldonon de la *Aŭstralia Esperanto-Vortaro*, kies neceso evidentiĝis dum la tradukado de la noveloj kaj poemoj en la *Aŭstralia Antologio*. En tiu unua eldono estis 700 eroj. Ĉi tiu, la kvara eldono, traktas 2000 erojn, inkluzive de multaj Nov-Zelandaj.

Laŭ mi, oni ne povas havi tro da vortaroj, kaj bona vortaro kvazaŭas literaturon. Jam dufoje mi tralegis ĉi tiun, kun plezuro. De A ("GET YOUR A INTO G") ĝis Z ("ZAMBUCK" — ne nur medikamento!). Kaj ankaŭ al mia ĝenerala informo. ACACIA estas *akacio*, jes, sed jen 14 tipoj! BELLS *sonoriloj*, sed ankaŭ *ŝiptempo*, plene klarigita. Mi lernis la devenon de TOERAG *fripono*, kaj ĝi ne signifas TOE RAG!

Odlo Bokserp iomete petolis, precipe en la komenco, kaj tute virgigis paĝon 6. Bagatelo.

Biologiaj kaj Zoologiaj terminoj abundas: ANIGOZANTHUS MANGLESII *anigozanto* — kangaroo paw ĝis ZOSTEROPS LATERALIS *arĝentokula zosteropo* — SILVEREYE. (Videndas tiu mirinda "PEKAPEKA".) Loko-nomoj, kelkfoje inkluzive de la origino, troviĝas: ALICE SPRINGS *Alica Fonto* ĝis ULURU — AYERS ROCK. Ni informiĝas pri la

latitudo kaj la longitudo de pluraj lokoj, ekz. de la Oz-a kaj NZ-a Teritorioj Antar-ktaj.

Jen akronimoj, ekz. ANZAC la ulo, la tago, kaj la biskvito, kun preskaŭ la tuta recepto! BYO mi konas, sed OYO? CER — hura!

Maoriaj esprimoj multe plias ol la Aborigenaj. (Niaj NZ-aj kuzoj pretas lerni la Maorian lingvon; ĉu iu Oz-a Esperantisto konas iun el la lokaj indigenaj lingvoj?)

Multaj esprimoj tiklas, ekz. DID HIS BLOCK *perdis sian egalanimecon*; KING'S CROSS *kvartalo de amuzejoj en Sidnejo*; SNOWBALL'S CHANCE *IN HELL nenia ŝanco*; DON'T PLAY SILLY BUGGERS WITH ME *ĉesu petoli*; bunĝi *plonĝi*; kaj tute ĉarmis min BRO REPAIRS *malsanulejo en Polinezia kvartalo de Aŭklando*. Kaj, ĉar ridoj sanigas, ne preterpasu la EFF-klarigojn.

Por veki vian scivolemon, jen kelkaj demandoj, kies respondoj facile troviĝas. 1) Tasmanio — kial la APPLE ISLE? 2) Ĉu KIWI BATTLER spegulas tiun en Oz? 3) Ĉu Oz havas duplikaton de la NZ-a BEEHIVE? 4) Ĉu NZ de nia COATHANGER? 5) Ĉu vi povus vin dekreĉiĝi de BUSH LAWYER (du specoj da!)? 6) Ĉu vi bone konas CHATEAU CARDBOARD? 7) Kio estas la Turka nomo de GALLIPOLI? 8) Ĉu PAKAPOO kaj PONGA odoraĉas? 9) Kio estas LEMON SQUEEZER en NZ? 10) De kie venis la NZ-a balotsistemo? (Vidu MMP.) 11) Se vi havas LOTS MOTZA ĉu temas pri fromaĝo? 12) Ĉu vi rekonas NIMBY se vi vidus tion? 13) Ĉu oni vizitas aŭ surportas PARRAMATTA? 14) Ĉu HOOKER SEAL estas ia velkro-zipo? 15) FIRE IN THE FERN — kial malgaja vortludo? 16) Ĉu vi manĝas ŝarkon aŭ festas je FLAKE? 17) Surportas THONGS aŭ FLIP-FLOPS? (Vidu la devenon de JANDAL-oj.) 18) Kiu estas la ofta sed evitinda esprimo por gresarbo? 19) Traduku DOOVERLACKY! 20) Ĉu vi malrapidigas la aŭton je la SPEED

HUMP aŭ ĉe la JUDDER BAR?

Ke io perdiĝas en la traduko ilumina HIS BLOOD IS WORTH BOTTLING li estas precipe meritoplena. La CHILLY BIN NZ-a pli allogas ol nia ESKY, kvankam kompreneble oni povas porti ankaŭ varmajn aferojn en ambaŭ. Prefere oni diru pri vi HE'S DONE HIS CHIPS ol HE'S HAD HIS CHIPS!

STARVE THE LIZARDS AND STONE THE CROWS sed BLUE estas multsignifa vorto en nia "Angla"! Trovu TRUE BLUE, MAKE A BLUE kaj BLUEY. (Parenteze, la aviadiloj de la nova fluglineo en Oz, Virgin Blue, estos ruĝaj, kompreneble!)

TO DRINK WITH THE FLIES trinki/ drinki sola. Jen oksimoro! (Tiu vorto troviĝas nek en Wells nek en Fulcher and Long. Laŭ Benson, "oksimoro". Laŭ PIV tamen "oksimoro".)

Se mi ne eraras, Peter Benson verkis sian vortaron dum tridek jaroj. Ĉi tiu vortaro ankaŭ sendube pli ampleksiĝos estonte. Kompreneble, tio povus esti senfina afero. Estas inda revualdoni ilustraĵojn. Sed ni marŝu antaŭ ol ni kuru. Jen pluraj aldonoj laŭ mi aldonendaj: THREE SHEETS IN THE WIND (por komplementi TWO BANGERS SHORT OF A BARBIE kaj NOT THE FULL QUID — vere Oz-aj); WADJELA por komplementi BELANDA, BEREEWOLGAL, PAKEHA; HE'S GOT THE CHOP *perdis sian postenon*; TO CLAM UP *ne paroli*; SUCKER kaj PATSY *naivulo*, *trompito*, *dupo*; DAGGY *malalloga*; DAKS ankaŭ *kalsono (subpantalono)*; POOR BUGGER *kompatindulo*; BLOODY HELL! esprimo de surprizo, ne nepre malbona (eble ne eleganta, sed multe pli sukoplana ol OH REALLY? aŭ YOU'RE KIDDING); skint *senmona*; GIVE SOMEONE THE FLICK *fini la interrilaton*; GET A GUERNSEY ankaŭ signifas *ricevi laŭdon por io bonege farita*; PADDY WAGON *polica aŭto kiu malliberigas*; ON THE WAGON *portempa alkohol-abstino*; PLONK DOWN *meti aŭ*

sidiĝi laŭte, *malelegante*; TO RABBIT ON *paroladadi*; GRIM REAPER *la morto*; SMOOCH por komplementi SMOOGE *kunkaresi, kisi, flati*; TO SPORT *surporti (ekz. brilan kravaton)*; TANK TOP *senmanika somera trikotajo* (moderna SINGLET sed ne subvesto); OVER THE HILL kaj PAST HIS USE-BY DATE *ne plu juna, vigla, kapabla*; THICK *hide malsentema*; THIN SKIN *ofendiĝema*.

Mi ĵus relegis *The Shiralee* de D'Arcy Niland, kaj jam trovis CHOW evitinda slangvorto por Ĉino; MOOSH *vizaĝo*; LINGO *lingvo*; POZZIE *sidloko*; HAVE TRUCK WITH *interrilati*. SHIRALEE mem signifas *ĝenaĵo, ŝarĝo*. (Parenteze en la televidprogramo "Parkinson" antaŭ nelonge mi aŭdis bonan Anglan esprimon TO BLAG kaj la signifo? *Blagi!* Ĝi ankoraŭ ne eniris Oz-NZ-on.) Mankas NEWIE *io nova*, kaj U-IE *U-forma enstrata turniĝo, precipe per aŭto*; la komerca PAYG por komplementi PAYE; CHARGES LIKE A WOUNDED BULL *pagigas tiom kiom vundita taŭro impetas* (tion faras mia GUMDIGGER).

Ankaŭ mankas originoj kiuj interesus. La origino de BOUGAINVILLE troviĝas, sed ne tiu de ALICE SPRINGS nek de MELBA. Mi serĉis LOO en miaj Anglaj vortaroj kaj trovis *kartludo kaj amo* (Skota!).

Ĉu mi pedantas dirante ke KNOCKED UP signifas *graveda* ne nur en Usono? (OOPS, mankaŭ ankaŭ A BUN IN THE OVEN.) Aŭ ke al GLORY BOX/HOPE CHEST oni aldonu "arkaika"? La modoj eĉ por domvaroj tiom rapide ŝanĝiĝas ke junulinoj preferas la plej lastatempajn aĵojn kaj ilojn. La kestoj mem ne plu aĉeteblas, escepte de brokantaj. Kaj DILLYBAG *ŝnursaketo* ankaŭ povas esti farita el iu ajn ŝtofo, sed fermiĝas per tirŝnuraĵo. YAKKA ja estas laboro, sed prefere YAKKING por *babilado*.

Vere estis inda kaj granda laboro kiun komencis Ralph Harry, kaj al

kiu aldonis Brian Fox. Mi forte rekomendas la libron al ĉiu Esperantisto.

Probable post lego de ĉi tiu longa recenzo vi sentas vin tute BUGGERED. Do iru trinki MIDDY aŭ LADY'S WAIST. Dume, mia mal-OCKER MALUKA atendas sian TUCKER. Mi iros kuiri INANGA kaj CHIPS, Sed lastan rakonteton mi ne povas rezisti. Vidu SEND HER DOWN, HUGHIE. Iun ŝtormoplenan tagon mi donis tiun defion, kaj Hughie akceptis. Subita kraŝo de fulmotondro super mia tegmento kadukigis miajn mikroondforon kaj telefonon. Do, estu singardaj! Ankaŭ gardu vin kontraŭ la TUTU kaj la NAKED LADY. Ambaŭ plenas je veneno.

HAERE MAI al ĉi tiu vortareto, kaj gratulojn al la aŭtoroj. BLOODY BEW-DY Ralph kaj Brian! □

AUSTRALIAN & NEW ZEALAND ESPERANTO DICTIONARY

recenzas Marcel Leereveld

Takso: (U) (U) (U) (U)

(Parto 1 de la recenzo)

Mian recenzon pri la tria eldono de ĉi tiu vortareto, en 1991, mi finis per la vortoj: “Mi povas varme rekomendi ĝin al ĉiuj por utila uzo, por kritikema studo, por ploro, por rido, kaj por kuraĝigi kompletigontojn.”

Mi povus fini la recenzon pri la nuna, kvara, eldono tute same, forstrekante tamen la vortojn “por rido”, ĉar ne plu enestas ridigaj stultetaĵoj (almenaŭ ne en la negramatika parto), kiaj kat-fiŝo, biskviĉjo, kaj akvopesto.

La kvara eldono bele aspektas. La literspecoj uzitaj estas facile legeblaj, pli bonaj ol la malagrablaj en la “Final Draft”. La 98 paĝoj havas klarajn paĝindikvortojn (ili tamen malĝustas

por la unuaj 28 paĝoj¹). Nur malavantaĝo estas ke la ĉirkaŭpaĝoj emas forkurbi de la resto; tio estas eraro de la presisto. Mi povis trovi nur 1 aŭ 2 preserarojn; do bonega finkontrolo! Evidente la verkistoj trovis neutila aldoni bildojn, kiuj ja enestis en la tria eldono.

Ĉar nialandaj Esperantistoj kiuj intencas traduki literaturaĵojn niajn Esperanten devas esti sufiĉe spertaj por ne bezoni ĉi tian vortaron, la precipa utilo de la nuna vortareto estas por tiuj Esperantistoj kies elnaskiĝa lingvo ne estas la Aŭstralia aŭ la Nov-Zelanda dialekto. Ili sekve komprenos la Esperantajn tradukojn pli facile ol la originalaĵojn. Ili estas tre malmultaj, sed mi supozegas ke pro lojaleco kaj pro interesiĝo preskaŭ ĉiuj niaj Esperantistoj deziras aĉeti la libron. Tio almenaŭ helpas la eldonadon.

La laŭdindaj aspektoj

Kvankam en mia recenzo mi mencias, poste, kelkajn aspektojn mallaŭdindajn, mi devas substreki ne nur la grandegan utilan laboron kiun la du verkistoj enmetis en la entreprenon, sed ankaŭ la multajn bonajn proponojn kaj la tre interesajn informojn, precipe prinovzelandajn por Aŭstralianoj kaj priaŭstraliajn por Novzelandanoj. Tiel la vortaro pliuuigas la du popolojn (precipe Esperantistajn), kaj helpas nin ekkoni nian reciprokan “kulturon”.

Min trafis speciale la ofta bonega (neneologisma) tradukado de esprimoj kiaj:

DILLY BAG (*ŝnursaketo*), DRESSER (*telermeblo*, aŭ ĉu *telerŝranko?*), GRADER (*tereбенigila veturilo*), GROUNDSHEET (*tertuko*), GRUBBER (*larĝa pioĉo*, ne **grubro*), GUNYAH

¹La presisto fuŝis la paĝaranĝadon de la unuaj 28 paĝoj, malgraŭ ĉiuj niaj klopodoj. — ■

(*provizora kabano*), IMMERSION HEATER (*plonĝvarmigilo*), KARRI (*kolora eŭkalipto*), KIORE (*pacifika rato*), KURI (*Maoria hundo*; sed kial do *dingo* por indigenara hundo?), LAY-BY (*rezerv-pago*), MARQUESAS ISLANDS (*Markiz-insularo*), MASONITE (*lignofibra plato*), MATILDA (*vagpako*), MILKSHAKE (*laktkirilaĵo*), MULGA (*ŝvela akacio*), BULL ANT (*soldatformiko*), TO PEACOCK (*strategie teraĉetadi*), A PEACOCK (*parademulo*), PEDESTRIAN CROSSING (*transpaŝejo*), PEKAPEKA (*Novzlanda vesperto*), PRESIDENT (*Prezidisto*), SPEED HUMP (*vojĝibo*), NO STANDING! (*Ne restigu aŭton!*), COACH BUS (*diligenco*), TARANAKI GATE (*dratpordo*), kaj WHEELIE BIN (*surrada rubujo*).

Ankaŭ ofte bonegas la nomoj de diversaj subspecoj ĉe plantoj kaj birdoj, kaj ĉe aliaj animaloj, ekz. ĉe PRAWN (2), RAIL (3), STERNA (11), kaj WAHLBERGIA (8); kaj vortoj el la (ĉu “Australasian”?) Afrikansa (Holande malaltĝermana dialekto) kia TO WORK A SLINTER (*agi ruze*).

Konsekvence la aŭtoroj meritas multe da laŭdo pro multe da bonego.

La procedaj aspektoj (iom strangaj)

(1) La naciisma deziro nelogike (Anglosakse) doni ĉefliteron al kelkaj adjektivoj: La Tasmania ĉefurbo; de Aŭstralia birdo, ktp.²

(2) Laŭsignife traduki kelkajn Aŭstraliajn provincoŝtatojn (Novsudkimrujo, Sudaŭstralio), sed aliajn laŭsone (Viktorio, Kvinslando). Se Kvinslando (kaj, cetere, Nuginio), kial ne *Njusauzvelso kaj *Njuzelando? Krome, Nov-Zelando signifas la Nederlandan provincon Zelando, nove kreitan post la inundoj de 1952.

(3) Kial la neinternacia “blinda

Freĵo” (aŭ Vilĉjo aŭ Paŭlĉjo)? Ĉu por kompreni Esperanton Neangloj devas unue lerni la Anglan lingvon?

(4) La duspeca sistemo nomi geografiaĵojn kun nomo de persono ktp. Unuflanke Markolo Cook, ktp., kaj aliflanke Kuk-Insularo, ktp. Ĉiuj tiaj kompreneble (kaj gramatike) devas nomiĝi Cook-Markolo, Chatham-Insulo, Cook-Insulo, ktp. (aŭ Kukmarkolo, Ĉetaminsulo, Kukinsulo, ktp). Markolo Cook (= nominacio) signifas “markolo kiu nomiĝas Cook”, ne “markolo kiu nomiĝas Markolo Cook”. Same pri la multaj aliaj tiaj.

(5) Ni havas en lingvoj (Esperanto kaj aliaj) diversajn vortojn por klasifiki la naturon ĉirkaŭ ni. Kelkaj el tiaj estas klaso, ordo, familio, genro, speco, kaj raso. Tiuj vortoj estas uzataj ankaŭ por pli science dividi la biologian mondon (zoologio, botaniko). Kial Esperantistoj amas fari esceptojn? Krom en ĝeneralaj signifoj la ses menciitaj dividaĵoj uzatas ankaŭ en la biologio, pli strikte. Kial fari escepton por unu el ili (specio, kaj ne por la aliaj (*klasio, *ordio, familio, *genrio, kaj *rasio)? Ĉar ni konsideras tion nenecesa kaj stulta. Same nenecese kaj stulte estas trakti kiel escepton nur unu el ili: specio, kion montras al ni pluraj etnaj lingvoj kiuj ne uzas tiun neregulan escepton.

(6) Nepardoneble estas enmeti personajn gustojn en vortaron. Jen kelkaj tiaj: la dakridio (Novzelanda arbo) estas bela. (Ĉu AEA eksigos min, se mi hazarde trovas tiun arbon malbela?) La ruĝaj beroj de skino (arbo) estas belaj (plej multaj homoj trovas ĉiujn ruĝajn berojn belaj); la ora pagro (fiŝo) estas *manĝinda* (ĉu eble estas reklamo por konverti niajn vegetaranojn?); la hemidejno (Novzelanda insekto) estas *malbela* (eble Nenovzelandanoj trovas ĝin bela kaj manĝinda!).

(7) (MYNA). Estas nesaĝe krei neolo-

²Verŝajne pro influo de la redaktoro de *ESK*, kiu uzas tiun kutimon ankaŭ en *ESK*. — ■

gismojn tiaj ke ili samas al jam uzataj vortoj por aliaj aferoj, ekz. Majno por la birdo, kontraŭ Majno la Germana rivero. Estis inteligenta decido de Zamenhof krei (kun kelkaj eraroj) radikojn de nur unu signifo (kun siaj metaforaĵoj). Malfacilas kompreni birdon kiel metaforon de rivero.

(8) En la Enkonduko troviĝas klarigo ke “if we use an Esperanto word outside of its regular definition, this does not avoid creating a neologism. For instance, if we were to translate cabbage tree with brasikarbo, we would merely be offering that as a neologism for either the palm *Livistona australis* in Australia, or the agave *Cordyline australis* in New Zealand.” Por solvi tion la aŭtoroj anstataŭe uzas la vortojn *Aŭstralia livistono* kaj *Novzelanda kordilino* por la du malsamaj CABBAGE TREES. Se nur ili estus farintaj tion ĉie! Jen du el la multaj esceptoj: *kivifrukto* (ĝi havas nenan rilaton kun *kivio*), kaj *apostolobirdo* (strutideo). Same nelogike estas uzi Maorian vorton (kun Maoria signifo eble ne transprenita): *takahoe* (= porfirio). Cetere, la klarigo en la Enkonduko estas neĝusta: metafora uzo estas permesata en (preskaŭ) ĉiuj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto. Oni devas zorgi nur ke ĝi estu internacie komprenebla, ekz. per antaŭmeto de *t.n.* aŭ per pli detala klarigo.

Eraroj en la enhavo

Kelkaj tiaj estas gravaj, aliaj nur gravetaj.

- (1) Ĉu GET YOUR A INTO G ne signifas ekrapidu pli ofte ol plirapidu?
- (2) Sub ALLOCASUARINA: TORTULOSA ne signifas *arbara*, nek VERTICILLATA *velka*. Kial la ŝanĝo?
- (3) AMARYLLIS BELLADONA ne povos nomiĝi *beladono*, ĉar tute alia planto ATROPA BELLADONNA jam oficiale nomiĝas *beladono*.

(4) Malgraŭ la nefidebla PIV, biero ne estas *sukcena*, sed sukcenkolora fluidaĵo.

(5) Aŭstralia piedpilko ne estas *piedpilko*: oni klarigu ke ĝi estas manpiedpilko, miksaĵo de HAND- kaj FOOT-ball.

(6) *Falfolia* arbo estas neklara termino, ĉar ankaŭ daŭrfolia arbo faligas siajn foliojn, sed iomete dum la tuta jaro, kvankam ĉiam restas parto de la foliaro. Pligiŝta estas la termino sezonfolia arbo.

(7) AUSSI BATTLER ne necese estas *kuraĝulo*, nur baraktulo, penadulo.

(8) BOVOVOJO estas la vojo kiun la bovoj faras irante al ekz. sia trinkejo. Prefere bovtransportvojo por BEEF ROAD, kvankam iom longa.

(9) *Tirbovo* sufiĉas por BULLOCK, ĉar kompreneble kastrita.

(10) BUSH: la kvin regionoj menciitaj estas tute arbitra invento. Krome, la dorlotita vorto *boŝo* estas tute neutila (escepte por nekompetentuloj), ĉar laŭ la vortarverkistoj mem ĝi havas 6 malsamajn signifojn (kun siaj 6 specialaj vortoj Esperantaj). Legante la nenecesan neologismon *boŝo* neni alilandano scias pri kiu el la 6 signifoj temas. Eĉ Aŭstralianoj/Novzelandanoj/Sudafricanoj ofte ne scias tion nek pri la Esperanta vorto nek pri la Angla. Do *boŝo* estas forĵetinda, ĉar oni ja ĉiam devas uzi unu el la 6 specialaj vortoj. Ĝia uzo polucius Esperanton same kiel ĉiuj nenecesaj neologismoj kaj servus nur patriotan memkontentigon.

(11) Sensala akvo nomiĝas *dolĉa akvo* nur post aldono de sukero.

(12) Ĉu kulturo ne estas “spirita vivkutimaro” anstataŭ la menciita “maniero de vivo de homgrupo”, kio estas moraro aŭ eĉ civilizacio?

(13) Ne ŝajnas saĝe nomi *Echium vulgare* (PATERSON’S CURSE) *purpura*

ekio (= eĥio) ĉar alia planto *Echium lycopsis* ankaŭ estas purpura eĥio (*purple viper's bugloss*), kaj la floroj

de ĝardenplanto *Echium virescens*, kvankam blupetalaj, aspektas tute purpuraj (pro ruĝaj stamenoj).

[Daŭrigota en la novembro-decembra ESK]

• *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary* 4th edition red. Ralph Harry kaj Brian Fox, nun haveblas. 98p., broŝ. Ĝi enhavas ĉ. 1600 kapvortojn. La prezo estas \$NS10, aŭ \$A8.00. Mendu de la Libroservo de AEA.

ĈU ADVERBA?

de Marcel Leereveld

En artikoleto “Ĉu adverba? Ĉu adjektiva? Ĉu ‘adfraza?’” mi menciis ke Zamenhof kelkfoje, por klareco, uzis adjektivon por difini infinitivon aŭ subpropozicion, kontraŭ sia kutimo. Mi tial decidis, por klareco, ĉiam uzi la ja ne konfuzan adjektivon en tiaj kazoj. Jen tri ekzemploj de tia pliklareco:

1. “Ili konsideris puni lin kontraŭ-regule.” Se ili konsideris ke (ies ajn) puniĝo estas kontraŭ la regulo: “Ili konsideris puni lin [esti] kontraŭregula” (la puno estas kontraŭ-regula).

Se ili konsideris, pripensis, ke eble ili punu lin ne normalmaniere, sed en maniero kiu estas kontraŭ la reguloj: “Ili konsideris puni lin kontraŭregule” = “Ili kontraŭregule konsideris puni lin.”

2. “Ni opiniis malĝuste ke la infano estu punota.” Se ni (ĝuste) opiniis ke la punado estas malĝusta: “Ni opiniis [esti] malĝusta ke la infano estu punota.”

Se nia opinio estis malĝusta (ni oponiis laŭ malĝusta kriterio): “Ni opiniis malĝuste ke la infano estu punota.” = “Ni malĝuste opiniis ke la infano estu punota”

3. “La sciencisto trovis hazarde ke la planto ne ekstermiĝis.” Se la

sciencisto trovis la faktan de la neekstermiĝo hazarda (= hazarda neekstermiĝo): “La sciencisto trovis [esti] hazarda ke la planto ne ekstermiĝis.” Se la trovo estis hazarda, se la sciencisto hazarde trovis ion: “La sciencisto trovis hazarde ke la planto ne ekstermiĝis” = “Hazarde la sciencisto trovis ke la planto ne ekstermiĝis.” □

Kio estas sekso?

“La afero kiu postulas la plej malgrandan kvanton de tempo kaj kaŭzas la plej grandajn problemojn.” (John Barrymore)

“La lasta granda homa agado ankorau ne impostata.” (Russel Baker)

“Perfekte normala kaj ordinara agado simila al dancado aŭ teniso.” (Aldous Huxley)

“La formulo laŭ kiu $1+1=3$.” (L. Levinson)

“Peko en teologio, malpermesata kunigo en juro, mekanika insulto en medicino kaj tempo, pri kiu filozofio ne havas tempon.” (Karl Kraus)

“Ruzo por daŭrigi la specion.” (Jerry Dashkin)

“Kontakto inter epidermoj.” (franca proverbo)

Kolektis kaj tradukis: Ionel Onet



Bill Thorne

EL LA KONGRESO EN TEL-AVIVO



Starantaj (M—D): Indrani Beharry-Lall, Paul Green
 Sidantaj (M —D): Kep Enderby, Hazel Green, Sandor Horvath, Dorothy Enderby
 La ses aŭstralianoj kunvenis ĉe kafejo en la kongresejo la 1an de aŭgusto. Ĉu Aŭstrialia kompleto por regi la mondon? (La aliaj kongresanoj suspektis!)

LA BIRDINSULO ISLAS RASAS de Sylvan Zaft



Se vi rigardus mapon de Meksiko, vi vidus apud la Pacifika Oceano mallarĝan duoninsulon kies longeco estas pli ol 1200 kilometroj. Tiu duoninsulo nomiĝas

Malsupra Kalifornio (“Baja California” Hispanlingve). Inter la duoninsulo kaj la ĉefa landamaso situas tre

granda brako de la oceano nomita la Golfo de Kalifornio. En tiu granda golfo estas tre interesa malgranda insulo nomita Isla Rasa. “Isla” signifas “insulo” en la Hispana.

Je kalma sunplena tago de aprilo 2000 nia naturkruzŝipo La Marleono alvenis al tiu insulo. Ĉirkaŭ kvindek el ni, pasaĝeroj, naturalistoj, ŝiplaboristoj kiuj ĝuis ripoztagon, eniris boatojn nomitajn “Zodiakoj” kaj motoris al la ŝtonoplana plaĝo. Sur tiu

insulo dum tri monatoj de la jaroj loĝas tri homoj kune kun preskaŭ duonmiliono da birdoj. La insulo estas parto de natura rifuĝejo protektata de la registaro Meksika.

Tre malofte oni donas permeson viziti la insulon. Oni deziregas kaj volas ke oni tute ne ĝenu la nestantajn birdojn. Pro tio ke la naturvojaĝa firmao Lindblad Special Expeditions donacis monon por la studado de la birdoj de la insulo, oni dufoje ĉiujare permesas viziton de unu el ties ŝipoj. Ni bonfortune estis elektitaj por tiu malofta sperto.

Sur la insulo loĝis Enriqueta Velarde. Ŝi estas profesoro kiu nun instruas ĉe la Universitato de Veracruz. Dum kvaronjarcento dum tri monatoj de la jaroj, la nestanta sezono, ŝi loĝas sur la insulo kaj studas la birdojn kaj, kun la helpo de malmultaj studentoj, laboras por protekti ilin.

Tri specioj de birdoj nestas tie en malgranda insulo kie la tero estas malfekunda. Tamen, kvankam la tero ĉie apud la Golfo de Kalifornio estas tre



Mevoj

malfekunda, la Golfo mem estas fekundega. Fiŝoj abundegas. Tial fiŝmanĝantaj birdoj abundegas. La malgranda insulo, escepte de du malgrandaj eroj, estas unu vasta nestejo por la mevoj Heermans (*Larus heermanni*). Tiu mevo havas grizan korp-on, grizan kaj nigran flugilojn kaj ruĝan bekon. En la insulo estas 250 000 tiaj mevoj. La mevoj konstruas la nestojn sur la grundo. La nestoj ne estas tre komplikaj. Iuj nestoj simple estas malprofundaj kavetoj, preskaŭ nur netuŝataj lokoj. Aliajn nestojn la birdoj tegas per partoj de malgrandaj plantoj kaj per plumoj. Po tri ovoj troviĝas en nesto.

En du partoj de la insulo situas nestaroj de ŝternoj. En unu loko nes-

tas 16 000 reĝaj ŝternoj (*Sterna maxima*). Tiuj ŝternoj troviĝas en diversaj partoj de Nordameriko kaj de Afriko. En la dua loko troviĝas en tre malgranda spaco la nestoj de 200 000 elegantaj ŝternoj (*Sterna elegans*). Ŝternoj estas marbirdoj kiuj estas eĉ pli sveltaj ol mevoj. Ili havas nigrajn ĉapojn.

La plej interesa fakto pri la mevoj Heermans kaj la ŝterno eleganta estas ke 95% el tiuj birdoj nestas nur sur Isla Rasa. En la nestada sezono se subite tiu insulo detruigis tiuj du specioj preskaŭ malaperus.

La profesoro gvidis nin al la ŝternaj nestejoj. Ni devis marŝi malrapide unu post la alia laŭ mallarĝa pado. La grundon de la insulo kovras ŝtonoj. Ĉie troviĝis mevaj ovojn. La ovojn similas ŝtonojn. Do ĉie estis ŝtonoj kaj ŝtonaspektaj ovojn. Ni devis marŝi ege zorge por ne frakasi ovojn.

Ni senpaŭze rigardis la grundon kaj metis la piedojn tie kie ne estis ovojn. La tutan marŝadon en niaj oreloj sonis mevablekoj. Tiuj vivaĵoj tute malŝatas vidi aliajn vivaĵojn kiuj apudas la ontajn birdidojn.

Finfine ni haltis tie kie ni povis vidi la nekredible densan nestaron de la ŝternoj elegantaj. La mevaj nestoj situas unu de alia je distanco de malmultaj metroj. La ŝternaj nestoj preskaŭ tuŝas la najbarajn nestojn.

Reirante tiel zorge kiel ni aliris, ni vidis alian malpli grandan sed simile densan nestaron kie troviĝas la reĝaj ŝternoj.

Mi vidis nur tri frakasitajn ovojn.

Tiun nokton profesoro Velarde prelegis al ni en la ŝipo. Ni lernis ke en la deknaŭa jarcento homoj laboris sur la insulo por Usonaj firmaoj prenante la tre valoran guanon kaj ke aliaj homoj kutime iris tien por preni la ovojn. Kaj kun homoj alvenis ratoj, ratoj kiuj estis granda danĝero al la ovojn kaj al la birdidojn. La nombro de

la mevoj Heermans kaj de la elegantaj ternoj multe malpligrandiĝis. Fine malpli ol tridek miloj da ĉiu specio ekzistis. Se la tendenco ne ĉesus la specioj estus en granda danĝero.

Sed la situacio ŝanĝiĝas. La registaro decidis protekti la birdojn. Ne plu homoj rajtos libere viziti la insulon. Per veneno oni en malmultaj jaroj plene detruis la ratojn.

Enriqueta Velarde respondis demandojn: Oni demandis ĉu homoj ankoraŭ venas por ŝteli la ovojn. Ŝi respondis ke foje homoj petas permeson preni ovojn, sed post kiam oni klarigas la bezonon konservi la speciojn, la vizitantoj komprenas kaj foriras.

Alia demando estis pri la malamikoj de la birdoj. Ŝi klarigis ke la birdoj nestas sur tia insulo kie ne povas vivi mamuloj kaj aliaj grandaj estaĵoj pro manko de nutraĵo kaj nesala akvo. La nura vera malamiko estas la fiŝaglo (Pandion haliaetus). Tamen malmultaj el tiuj ekzistas en la regiono. Kelkfoje unu alflugas kaj elektas ŝternon aŭ mevon kaj mortigas kaj manĝas ĝin sed pro la tiea malofteco de tiuj ĉasbirdoj nur ono el unu procento de la birdoj tiel mortas.

Oni demandis ĉu ŝi iam malŝatas vivi sur tia insulo dum kvarono de ĉiu jaro. La respondo estas ke post dudek kvin jaroj la surloka studado de tiuj birdoj ankoraŭ fascinas ŝin.

Nun ĉar preskaŭ neniuj homoj vizitas la insulon kaj ĉar la ratoj estis tute nuligitaj, la mevoj kaj ŝternoj estas sekuraj kaj la nombro de la du specioj kies plej ŝatata nestoloko estas tiu insulo ade pligrandiĝas. Nun la mevoj Heermans kaj la ŝternoj elegantaj komencas nesti en aliaj lokoj en la Golfo de Kalifornio.

Ni ŝipvojaĝantoj estis tre dankemaj ke ni povis viziti tiun insulon kies lastatempa historio estas tre feliĉa por la onco de du birdaj specioj kiuj iam, inte, eble malaperis. □

KOREKTO

En la du antaŭaj numeroj ni ellasis la nomon de Vera Payne en la listo de la ekzamenistoj. Ni profunde pardonpetas al ŝi. □

ĤRISTO METEV

raportas Bob Felby

Ĥristo Metev, estimata — kaj amata de ĉiuj gesamideanoj — suferis fortan baton de la Ministro Pri Enmigrado. Estis dirite al li ke li ne plu estas bonvena en Aŭstralio.

Ĥristo subite telefonis al mi el Sidnejo, ke li atendas la aviadilon al Zuriko por poste daŭrigi la flugadon al Sofio, Bulgario. Li devis provi peti permanentan restadpermeson el ekster Aŭstralio, ĉar la leĝo tion postulas. Li intencis provi iri provizore al Novzelando, al kiu bonkora samideano jam lin invitis, sed kiam la Novzelandanda ambasadoro aŭdis ke lia pasporto estas Bulgara, li diris “Forgesu tion!”

Nun nia kompatinda amiko do ferias apud Nigra Maro, vizitas siajn multajn amikojn, Esperantistajn kiel ankaŭ neesperantistajn. Ree li havas okazon aŭdi kaj paroli sian amatan gepatran lingvon, kaj samtempe ĝui la varmegan someron de Bulgario.

Tamen, por vera Esperantisto tio neniel sufiĉas. Ĥristo deziras loĝi en lando, en kiu la registaro pretendas ke ĝi estas multkultura. Kaj neniuj estas pli multkultura ol Ĥristo. Li parolas multe da lingvoj, estas tre muzikema, sperta librobindisto kaj librotenisto. Esperanto en Sudaŭstralio bedaŭras la perdon de sia tre bona sekretario, sed ne nur Sudaŭstralio perdis, la tuta Aŭstralio perdis ne nur lertan kunlaboranton, sed ankaŭ tre bonkoran amikon.

Tamen, almenaŭ Ĥristo ankoraŭ ne perdis kuraĝon nek esperon. Li di-

ris al mi ke tuj kiam li havos permanentan adreson en Bulgario li skribos al Aŭstralia Esperanto-Asocio petante invitleteron. Per ĝi li pli facile havigos al si permanentan restadpermeson en Aŭstralio. Aŭstralia Esperanto-Asocio deziras al li ĉiun sukceson, kaj esperas tre baldaŭ revidi lin inter ni! □

NZZA KUNVENO/KONGRESO 2001

En Nov-Zelando NZEA aranĝas jarkunsidon kaj kongreseton por frue en januaro 2001. Pli precizaj detaloj pri kostoj sekvas post nelonge.

La kongresejo estos Alpers Lodge en Newmarket, Auckland. Krom la t.n. "White House", la kunvensalono/konferencejo, oni povos utiligi la ĉi tiean restoracion, kaj loĝeblecon. Alpers Lodge (membro de Flaghhoteloj) ĉe 16 Alpers Ave, Newmarket, situas proksime al la vigla Broadway (por butikumado), la Muzeo situanta en la fama parko The Domain, Parnell, kaj la urbocentro.

La programo daŭros tri tagojn: Vendredon la 5a, sabaton kaj dimanĉon 6a kaj 7a de januaro 2001. Ni antaŭvidas ke ĉirkaŭ 20 ĝis 35 anoj trovos la lokon komforta kaj tre konvena. Aŭtojn oni povos lasi en la hotelparkejo. Utiligo de aŭtobusoj por iri al la urbocentro kaj haveno estos facila.

Estas notinde ke en la sekva semajnfino komenciĝos la somerkursaro de AEA en Melburno.

Kun espero ke ĉisomere ni havos okazon renkontiĝi enkadre de nia kongreseto en Aŭklando aŭ por bonfortunuloj en ambaŭ okazaĵoj.

Koran saluton sendas Bradley McDonald Prezidanto de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. □

SCIU: VI DEVUS HALTI SE:

de Grigorij. L. Arosjev

- vi opinias malbonŝanculoj homojn kun modem-rapideco 28.8 kbs;
- vi uzas ridetojn [:-)] en papera korrespondado;
- vi ne konas la sekson de viaj plej bonaj amikoj, ĉar ili havas neŭtralajn retnomojn, kaj demandi ilin vi ne konjektis;
- por rideti vi klinas la kapon flanken je 90 gradoj;
- vi sentas korvarmon se en TV-reklamo vi vidas www-adreson de iu kompanio;
- elirante el ĉambro vi fiksas la plej grandan laŭtecon de la komputil-amplifikiloj por ne preterlasi momenton kiam venos nova retpoŝto;
- via hundo havas hejman retpaĝon;
- vi ne povas komuniki kun la gepatroj ĉar ili ne havas modemon;
- vi kontrolas la retpoŝton. Se novaj mesaĝoj forestas, vi refoje kontrolas ĝin;
- vekigiinte je la tria nokte por necesumi, vi restas ĉe la komputilo ĝis la mateno;
- via edzino malpermesas preni notlibran komputilon en la liton;
- vi havas korpotaŭton kun la teksto: "tiu ĉi korpo estas plej bone rigardebla per Internet Explorer 4.0 aŭ pli malfrua versio";
- trafinte aŭtoakcidenton, vi aŭtomate serĉas butonon "Retroen";
- traleginte ĉion ĉi vi unuavice resendas tiun ĉi tekston al amiko. □

DIVERSAĴOJ

- **La Bahaa Esperanto-Ligo** nun havas 380 membrojn en 59 landoj, laŭ sia bulteno *LA BELMONDA LETERO*. La "printempa" [norda hemisfero]

numero multe mencias nian Aŭstralian Paul Desailly.

- **La Nigra Cigno**, bulteno de la Esperanto-ligo de Okcidenta Aŭstralio, perdis sian redaktoron en julio. John Mills, post multjara redaktado, ekŝiĝis el la redakta posteno. Nova redaktora teamo konsistas el John Massam kaj Alan Mendelawitz.

- **En San Francisco apud la fama MUZEO DE MODERNA ARTO** ĉe granda parko YERBA BUENA GARDENS en la centro de la urbo, sur la muro de teatro, oni povas legi frazon en Esperanto.

Ĝi estas tiom granda ke ĉiuj kiuj iel pasas tiun parton de la parko certe vidos ĝin. La teksto jenas: “Per niaj flugantaj aŭtobusoj, vi atingos iun ajn parton de la mondo.”

Post iom da esplorado fare de la lokaj Esperantistoj evidentiĝis ke la afero tute ne rilatas al Esperanistoj kaj fakte temas pri arta projekto de la teatro. Oni invitis “vortartistojn” krei afiŝegojn pri la temo “interkonektiĝo kaj mondskala komunikado”. Programfara firmao iniciatis la projekton, sed ĝin faris la teatraj instancoj. La teksto estas ne provizora ornamajo; ĝi videblos dum almenaŭ kelkaj jaroj!

Multaj kursanoj de ĉi-jara Somera Kursaro ĉe la Ŝtata Universitato en San Francisco jam ekskursis al la urbo por vidi ĝin.

[Informis Reza Kheirkhah
Fonto: *ret-info*]

- **Retpoŝtaj adresoj:**

Aldone al la listoj en nia januara kaj marta numeroj:

Astrid Erb: <astrid@box.net.au>

Esperanto Federation of NSW:

<ESPERFED@ans.com.au>

Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio:

<esperanto@iexpress.net.au>

<<http://www.iexpress.net.au/~esperanto>>

Shirley Gradussov:

<shirleyg@eon.net.au>

John Harvey:

<harveyclan@hotmail.com>

Anthonia Jansen:

<hank@xtra.co.nz>

Svetislav Kanački:

<stevskank@hotmail.com>

Owen Loneragan:

<owlono@internetexpress.net.au>

Olive Looman-Breeze:

<olive.looman@clear.net.nz>

John Massam:

<john.massam@multiline.com.au>

Alan Mendelawitz:

<alano@global.net.au>

John Mills:

<jmills@southwest.com.au>

Sheryl Ridout:

<pmont@perthmontessori.wa.edu.au>

Novaj retadresoj:

Novzelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

Bob Felby esperantobob@one.net.au

Jay Mooney: <jgrant@gil.com.au>

Dennis Pease: <dbpnz@bigfoot.com>

- **Islandaj tradukaĵoj en Esperanto:** Bonaspekta, bone presata kvarmonata revuo La Tradukisto prezentas Esperantajn tradukojn de Islanda literaturo, kaj ankaŭ kelkfoje modernisland-lingvajn tradukojn de originalaj Esperantaj verkoj. La kajeroj de la revuo ampleksas po 24 paĝojn. Jam aperis 34 numeroj de la revuo. Jarabono kostas \$US9, kaj ĝi estas abonebla pere de UEA (konto hjr-1). Por informoj kaj specimena ekzemplero kontaktu: Hilmar Jon Bragason, PO Box 31 Tröd, IS-840 Langarvatni, Islando.

[Laŭ *esperanto USA 3/2000*]

- **Jarlibro de Internacia Naturkuraca Asocio:** Akurate antaŭ la UK en Tel Avivo aperis la jarlibro de INA (INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO). La jarlibron ricevas ĉiu membro de INA kiu pagis sian kotizon. La kotizo estas €20.

INA ofertas al siaj membroj vastan gamon da servoj pri kiuj vi povas informiĝi detale en la jarlibro *Naturkuracado 2000*.

Nemembroj povas aĉeti la jarlibron *Naturkuracado 2000* (ISBN 3-89240-112-8) por €10 en la Esperanto-libro-servoj.

Naturkuracado 2000 ampleksas 99 paĝojn kun multaj ilustraĵoj kaj vasta fasko da temoj, i. a. pri Saam, la Korea akupunkturo; pri Baŭnsajtismo, la tiel nomata akupunkturo de la okcidenta mondo; saniga rajdado; malofte uzataj Eŭropaj kuracherboj ktp. Ankaŭ praktikaj konsiloj ne mankas. Tiel vi ekscias pri la saniga valoro de memproduktitaj ĝermoj kaj lernas kuiri bongustan Korean manĝaĵon.

Naturkuracado 2000 estas legebla ankaŭ interrete. Vi trovas ĝin en la paĝaro de MZ-eldonejo ĉe

http://www.mz-verlag.de/INA/Publikationen/INA_jarlibro_2000_online.pdf

kaj en la paĝaro de INA ĉe

<http://www.esp-ina.com>

[Fonto: *ret-info*]

• **Sukcesis en la Elementa Ekzameno de AEA:**

Audrey Felby (Suda Aŭstralio)

Erhard Claus (Kvinslando)

• **La Angla — malfacila lingvo:** Kelkaj nesciuloj pretendas ke la Angla jam estas la internacia lingvo, aŭ ke almenaŭ ĝi estas lingvo taŭga fariĝi internacia. Sed sperto antaŭ nelonge de la Japana ĉefministro montris ke rapide lerni iom de la Angla havas danĝerojn. Yoŝiro Mori estis vojaĝonta al Usono por konatiĝi kun Vilĉjo Clinton, kaj Japana ĵurnalisto persvadis lin lerni kelkajn vortojn de la Angla por unua kontakto antaŭ ol transdoni respondecon al interpretisto. La ĵurnalisto konsilis ke je la unua kontakto kun sia gastiganto li diru “How are you?” (Kiel vi fartas?). Clinton certe respondos: “Mi tre bone fartas” al kio Yoŝiro Mori povos aldoni: “Ankaŭ mi”. Post tio la interpreto respondecos. Sed Yoŝiro Mori

faris erareton. Kiam Clinton premis lian manon li diris: “Who are you?” (Kiu vi estas?). Clinton, surprizita, respondis ŝerce: “Mi estas la edzo de Hilary”. Tuj Yoŝiro Mori uzis sian duan Anglan frazon: “Ankaŭ mi”!

[Raporto de Stephen Lunn en *The Australian* la 31an de julio 2000. Kontribuis Ralph Harry]

• **Bialostok-ano de la XX-a Jarcento.** La pola taggazeto *Gazeta Wyborcza*, Radio Bialystok, kaj Tele-wizja Bialystok organizis plebisciton je la temo “Bialostokano de la XXa jarcento”. La organizantoj volis sciigi kiu el la eksaj kaj nunaj anoj de la urbo plej promociis kaj famigis la urbon. Kiu el ili, per siaj vivo kaj atingajoj plej multe aldonis al komunaj akiraĵoj de la urbo, al la akiraĵoj de kelkaj generacioj. Venis miloj da respondoj kaj centoj da proponoj. La organizantoj preparis el la propono liston de la 50 plej popularaj personoj. La listo informas:

1. Ludwik Zamnehof : 6337 voĉoj “kreinto de internacia lingvo”

2. Jerzy Maksymiuk 3433 voĉoj “fama pola muzikisto kaj orkestrestro”...

20. Jakub Szapiro 335 “Esperantisto kaj Esperanto-movadano”

[Fonto: *ret-info*]

• **Invito al la UK 2002 en Brazilo:** Al nia tutmonda samideanaro de nun mi elkore konsilas nepre partopreni la 87an Universalan Kongreson en Fortaleza, Brazilo. Kial? — Unue, ĉar UK en tropika lando devigas ĉies koron bati pli varme... Due, ĉar nia popolo estas ege gastama... Trie, ĉar en Fortaleza kaj ĉirkaŭaĵo elstaras la plej riĉaj Brazilaj popol-artaĵoj... Kvare, ĉar paradizaj marbordoj vin atendas vid-al-vide al plurkoloraj flosoj serene velveturantaj sur tepidaj verdaj ondoj! Krome, la antaŭpostkongresaj ekskursoj fariĝos neforgeseblaj travivaĵoj sub la brunigaj radioj de la ĉiopova Reĝo Suno, en la Ŝtato Ceará, nordoriente en nia kar-

navalema futbalema Brazilo. La 87a UK en Fortaleza (3-10 aŭgusto, 2002) fulmotondre alproksimiĝas, kedu!...

Amarílio Hevia de Carvalho
Caixa Postal 246
78600-000-Barra do Garças-MT
Brazilo



•**IBAN: Internacia bankkonto-numero:** Firmoj kiuj komercas internacie estonte menciuj du kontonumerojn sur siaj fakturoj: la nunan por enlanda uzo; alian, iom pli longan, por internacia uzo. Ekzemple Belga kontonumero nun havas strukturon kia: 510-0075470-6.

La internacia numero estas la sama, tamen kun 8 antaŭantaj signoj: IBAN BE62 510 0754 7061.

“IBAN” indikas ke la numero havas la norman strukturon, “BE” estas la ISO-landkodo kaj “62” estas kontrolcifero; la tuto estas grupigita en po 4 signoj. La bankoj aŭtomate komunikos la novan numeron al siaj internacie negocantaj klientoj.

Por kelkaj landoj ankaŭ aldoniĝas kodo kiu indikas la bankon. Ekzemple Nederlanda numero kiu nun estas: 041 71 64 300 por internacia uzo iĝos IBAN NL91 ABNA 0417 1643 00, kie “ABNA” estas la kodo de la banko, IPI: Internacia pag-instrukcio.

Nun ĉiu banko havas sian propran formularon por doni internacian pag-instrukcion. Estonte estos tutmonde

normigita formularo kiun la liveranto povas prepari samtempe kun la fakturo.

[El *La Merkato*, n-ro 69, julio 2000]

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

Trevor Steele, 15 Julio 2000:

Mi mem decidis ŝanĝi la profesion: mi ekde nun volas traduki kaj fari aliajn taskojn per e-poŝto (parte por ne devi refoje labori en mezlernejo en Aŭstralio, sed ankaŭ pro pozitivaj kialoj). Ĉar la bezono de tradukado estas probable malpli en Aŭstralio ol en ĉiu alia lando, mi reiros dum unu jaro al Litovio daŭrigi mian ege simpatian E-instruadon tie — sed samtempe por akiri klientojn. Mi esperas reveni definitive al Aŭstralio post la zagreba UK, kun sufiĉe da klientoj por vivteni min kaj, se la revo plenumiĝas, kun edzino.

Trevor Steele <steele_trevor@hotmail.com>

Maurício Borges, 17 julio 2000:

Mia nomo estas Maurício José Spada Borges, mi estas 24 jara kaj aktuale mi frekventas la lastan semestron de la kurso de tradukado ĉi tie en Brazilo. Mi delonge studas la Anglan kaj la Hispanan lingvojn, sed mi ankoraŭ ne havas ian internacian sperton. Ĉar mi bezonas kelkajn informojn pri via lando mi petas vian helpon. Al mi plaĉus aranĝi ian oficon en via lando por ke mi praktiku la lingvojn kiujn mi lernas. Sed mi havas multajn dubojn:

*Ĉu la kostoj tie estas karaj?

*Kie mi povus aranĝi pri loĝejo aŭ gastejo?

Mi intencas resti ĉe via lando dum kelke da monatoj, do mi devas perlabori miajn vivrimedojn. Ĉu vi konas ian kompanion kie mi povus labori? Nu, mi jam ĉagrenis vin multe! Mi atendas vian baldaŭan respondon

senpacience. Mi dankas vin anticipe.
Kun koraj salutoj,
Mauricio

Maurício Borges <mborges@unorpn-
net.com.br>

• **Zoran Popovic 18 aŭgusto 2000**
(teksto nek korektita nek redaktita):

Karaj Gesamideanoj,

Mi estas Zoran Popovic el Belgrado (Serbio, Jugoslavio), arkitekto kaj prospekta Aŭstrala en-migranto pri kion mi bezonas prepari kelkajn informacioj. Mi estas en proceso de visogajneco kun posto de DIMA en Aŭstrala Embasio en Belgrado, kiel sendependa-eksperta migranto (“Skilled-Independent Migrant”) kaj mi jam ricevis pozitivan respondon sed devas ankaŭ, inter alia, provi “bonaj kredeblecoj” ke mi estos facile establita en Aŭstrala societo. Pri tion, mi devas montri subskribitaj “statutaraj deklarioj” de Aŭstralaj residentoj kiuj povas kaj volas, se estus necesita, min helpi ia maniere kun labor-serĉo, aŭ trovi loĝejon, ek nur kun instrukcioj. Mi esperas rezidi en Sydney, tamen kredas ke iuj Aŭstralianoj povas skribi supre nomitaj deklarioj. Se vi eblas min helpi, mi petas respondu inter-rete kaj sendu subskribitaj deklarioj, kiel frue kiel eble, al:

Zoran Popovic
Grcica Milenka 4-B/84
11000 Beograd
Yugoslavia
eŭrope

Mi citas partoj de letero obtenita de Embasio kun klarigo kion mi egzakte bezonas:

“One of the requirements is that you show that you are likely to become established in Australia without undue personal difficulty or without imposing undue difficulties or costs on Australian community. For this, you should provide: Evidence of support from relatives or contacts

resident in Australia who are willing to assist you with accomodation, advice, living expenses and other forms of support if necessary upon your arrival in Australia. You yourself may provide a statement to this effect, however your relatives/contacts should express the extent of their support on a Statutory Declaration form available in Australia and witnessed as indicated.”

Koran dankon ĉiuj! Zoran Popovic
<zoran_o_popovich@yahoo.com> □

Lanĉado de nova vortaro:

Du-dek unu personoj partoprenis amikecan kunvenon en la librovendejo Bennetts en Aŭklando por la Nov-Zelanda lanĉado de la Australian and New Zealand Esperanto Dictionary. Inter la amikoj kiuj partoprenis estis la loka parlamentano David Culliffe, kaj loka ĉefo de United Nations Association Peter Honeybun. Je la kvara ptm en sabato 29 julio 2000, Bradley McDonald, la Prezidanto de NZEA, parolis al la ĉestantaro pri Esperanto en la mondo kaj en Nov-Zelando. Brian Fox informis pri la kialo de la vortaro, kaj ĝia origino ĉe Ralph Harry. Sekvis fervora diskuto inter la Esperantistoj, amikoj, kaj libroaĉetantoj. La direktisto de la librobutiko, Trevor Fatt, aranĝis tablojn por montri la vortarojn, Esperantolibrojn kaj informilojn. Li disaŭdigis muzikon de Esperanta kompakta disko. Ankaŭ haveblis vino, fruktosuko, kaj fromaĝoj. Ni vendis dek kvar vortarojn en la librovendejo, kaj post horo kaj duono da ĝuiga tempo ni adiaŭis malnovajn kaj novajn amikojn de Esperanto. Ja estis sukcesa okazo por meti Esperanton antaŭ la publikon en butiko de seriozaj libroj.

Ni rekomendas la ideon al aliaj Esperanto-grupoj en Nov-Zelando kaj en Aŭstralio. □

FOR LA GRAMATIKON!

de Marcel Leereveld

Mi iom ektimis (pri li aŭ pri mi aŭ pri ni ambaŭ) legante an la junia ESK (p.6) la sekvajn frazojn de nia erudicia redaktisto: "...refreŝige senjargona, kaj ne strebas trudŝovi Esperanton en la rigidajn vitrajn ŝuojn de la grek-latinaj kategorioj" kaj "T.e., tre konservativisma prezento de gramatikaj temoj, uzanta la terminologion kaj aranĝon grek-latinajn popularajn dum la 19a kaj frua parto de la 20a jarcentoj".

Ĉu li ne rimarkis ke la moderna terminaro gramatika kaj la modernaj lingvismaj teorioj, ekintaj kun la nun jam ne plu seriozkonserataj Chomsky'ajoj, neniel ŝanĝis, nek povis ŝanĝi, la lertan fundamenton de la grek-latinaj teorio kaj terminaro lingvismaj? Ke ĉiuj tiuj modernuloj nur donis matematikan aspekton al la gramatiko por ŝajnigi ĝin pli scienca kaj pli prilaborema, kaj tial pli "refreŝiga" ĉar simple uzanta malsamajn "rigidajn vitrajn ŝuojn"? Ke la nura avantaĝo estis ke lingvistoj povis prezenti sian scienccon kiel meritantan pli da atento kaj pli da libroeldonado kaj pli grandajn lekciklasojn? Ke la nura malavantaĝo de la grek-latina lingvoteorio kuŝas en tio ke la etnaj lingvistoj (precipe Anglaj kaj Francaj Esperantaj) ne kapablis adapti ĝin al siaj lingvoj? Ke la tuto estis nur kosmetika?

Nu, kompreneble Don rimarkis tion. Tial mia mistifikiĝo. Kion li vere celis per tiuj enigmaj frazoj? Mi pensadis kaj ankoraŭ ne scias kiu el pluraj aspektoj de la malmoderna lingvisma teorio lin ĝenas:

1) Ĉu li eble ne komplete komprenas la praktikon de tiu gramatiko? Mi estas centprocente certa ke tio ne estas la kazo.

2) Ĉu li trovas ke ne eblas klarigi ĝin al la normalaj lernantoj de aliaj lingvoj, kaj ke tial ĝi ne valoras? Se tio estas la kazo, li nur parte pravas, ĉar la komprenebleco dependas de la lerninteco en junaĝo kaj de la tiama klarigmetodo.

3) Ĉu li ne kuraĝas aŭ deziras ŝanĝete adapti la gramatikteorion al lingvoj ne Greka nek Latina? Tiun emon, se ĝi aplikiga, kaŭzis lia fido en la senescepta praveco de eminentaj lingvistoj.

4) Ĉu eble li opinias ke ni bezonas la bazajn terminojn tradiciajn, sed ke ni troigas kaj ke ni uzu nur tiujn bazajn, forlasante plurajn negravajn distingojn kiaj: lokaj, tempaj, ktp. adjektoj, kaj la diversaj specoj de adjektivoj. Kvankam li laŭ mi tute pravas pri tio, tio ne estas tialo por anatemi la tuton.

5) Aŭ ĉu ni tute ne uzu gramatik-indikajn terminojn, sed nur priskribu la diversajn frazfunkciojn kaj vortkategoriojn? Tio estos tre temporaba afero.

6) Ĉu li eble pensas ke ni bezonas aliajn, pli Esperantajn terminojn, ekz. Aganto, aŭ Unua Determinanto, por Subjekto, Agvorto por Verbo, Nomvorto por Substantivo, Aldonaĵo por Adjekto, ktp.? Laŭdinda penso, sed malfacile enkondukebla.

7) Aŭ ĉu ni tute ne menciu nek klarigu la kategoriojn kaj la frazfunkciojn? Nur infanoj tiel kapablas bone lerni fremdan lingvon (kiu por ili tiam ne estas "fremda"), sed ne plenkreskuloj.

8) Aŭ ĉu ni devas ŝanĝi la tradiciajn konceptojn pri kateogrioj kaj funkcioj al tute aliaj gramatikaj konceptoj (kiel en kelkaj Amerikaj kaj Ĉinaj lingvoj), tamen retenante la gramatikajn formojn Esperantajn (li ja ne deziras detrui Esperanton) por "refreŝigi", ne "trudŝovi Esperanton

en la rigidajn vitrajn ŝuojn”? Don tiam devos elverki tian senĵargonan gramatikon (ne la tradiciecan Wennergren’ajon), sed mi palpe suspektas ke li nekonscie malŝatas la regulojn por ke li senskrupule povu akcepti la plurajn gramatikajn erarojn kaj esceptojn kiujn la de li (kaj de mi) admirataj Esperantistegoj faris kaj plu faras.

9) Aŭ ĉu li trovas Wennergren “refreŝiga”, ĉar tiu kapablas, ne uzanta lingvismajn konsiderojn, lerte “pravigi” la ĝustecon de malĝustaĵoj kaj tiel instrui lin pri Esperanto (“Mi mem multe preferas uzi la PMEG-on de Wennergren”). Bedaŭrinde, des pli admirinda estas onia karaktero, des

pli oni fidas aliajn karakterojn.

10) Ĉu li eble, kaj ĝuste, pensas ke la gramatikaj terminoj kelkfoje uzas vortojn kiuj malbone aŭ eĉ erare priskribas iliajn verajn signifojn, kiel Prepozicio (=Interpozicio), Medialo (=Pasivo), Pasivo (=Medialo), Subjunktivo, Kondicionalo, ktp.? Sed tio en Esperanto ne gravas, ĉar ili en Esperanto ne estas formitaj el aliaj vortoj, kaj krome vorto Esperanta ne ĉiam, nek necese, havas la saman signifon kiel en etna lingvo.

Mi ŝvebas en senpezo rilate la veran signifon de tiuj strangaj Don’aj vortoj prigramatikaj.

[Vi devos ŝvebadi ankoraŭ du monatojn, Marcel, sed en la novembra numero de ESK mi esperas prezenti miajn vidpunktojn pri la afero. ■ □]

EL LA REGIONOJ

NSW: En la lastaj honoroj al Aŭstralianoj, S-ino Gluck ricevis OAM-on. (Order of Australia Medal) pro sia servo al la komunumo de NSK, pleje la Juda komunumo, kiel filantropo. El artikolo: “S-ino Gluck devis uzi sian mastradon de lingvoj por eviti la koncentrejojn de la dua mondmilito. ‘Lingvo ĉiam estis mia plej bona amiko en la vivo. Mi postvivis tiun epokon ĉar mi povis paroli Aŭstrian specon de la Germana — la Germanoj certis ke mi estis Aŭstriano. Estis persekutado en Aŭstrio sed mi evitis ĝin per mia memfido kaj sentimemo. Mi eĉ mem faris mian propran pasporton.”

[Laŭ *Telopeo* Aŭgusto 2000]

En la pasintaj du jaroj forpasis pluraj Aŭstralianoj kies verkoj estas en Aŭstralia Antologio. En Decembro 1996 mortis John Rowland, aŭtoro de Pejzaĝo (Landscape) kiun tradukis Ralph Harry. Patrick White, kiu permesis sen entuziasmo la inkludon de traduko (ankaŭ farita de Ralph) de la unua ĉapitro de La arbo de la homo (Tree of Man) ankaŭ forpasis. La 13-

an de oktobro 1999 membroj de la Manlia Klubo laŭtlegis la antologian elĉerpon el La ŝuoj de la fiŝisto de Morris West, kiun Ralph Harry konsilis antaŭ la vizito de Sro West al Sajgono por rikolti informon por la libro La Ambasadoro. En junio de la nuna jaro oni legis en la Angla kaj Esperanto la poemon *Nigras Kakatuo* (*Black Cockatoos*) de Judith Wright, kaj en la plej lastakunveno de la Klubo oni legis “Rentgena Fotografajo” de A.D. Hope. Estus interese se oni povus persvadi la aŭtorojn kies verkoj aperas en la *Antologio* kaj kiuj ankoraŭ vivas, registri la poem(j)n aŭ elĉerpaĵojn. Tio estus valora aldono al verko kiu estas tre speciala por la Esperanto-movado ne nur en Aŭstralio sed en multaj landoj. Oni jam petis permeson de Les Murray fari sonbendon kun lia legado perABCde“Ĉielarkokompleteordinara”.

Qld: De Auckland al Aŭstralio venis Brian kaj Jackie Fox dum junio. Ili gastis ĉe Kay Andersen en Brisbano dum tri noktoj, 6-8 junio. Je la vespero de la 7a ili ĝuis vespermanĝon kaj

interbabiladon kun diversaj Esperantistoj.

Aperis en la Brisbana Esperanto-Societo du novaj vizaĝoj: Brian Alexander, kiu hejmlernas Esperanton per la libro *Teach Yourself Esperanto*; kaj Garnet Brose, kiu ankaŭ hejlstudas per tiu lernolibro.

En la U3A Kay Andersen instruas du klasojn pri Esperanto. La klaso por komencantoj enhavas du studentojn; la klaso por progresantoj ankaŭ du studentojn — ili studas la trian nivelon de la korespondokursoj.

[Laŭ *Brisbana babilado* jun-jul. 2000]

[Kontribuis Ralph Harry]

• Gratulojn al Jay Mooney [antaŭe nomata Jay Grant] pro ŝia nova filino Laura naskita la 26an de julio. Jay kaj Alan sendis ĉi tiun foton pri la nova familio:



DISKUTO PRI RAŬMO

(1) de Mark Fettes

1. Raŭmo kaj postmoderno

Por mi, Raŭmo prezentis du ĉefajn valorojn, unu negativan, unu pozitivan. Pri la dua mi parolos poste, post iom da prilaboro de la teoria kampo. Nun, enkonduke, mi fokusigos al ĝia negativa valoro, komuna al ĉiuj postmodernaj

pens-tendencoj. Temas pri ĝia kritika sinteno al la modernismo, ĉi-kaze modernismo en la Esperanto-movado, kiun enportis kaj evoluigis la okcidenteuropaj ideologoj de la “Franca periodo” kaj poste.

Modernismo strebas ordigi la mondon; la parlamentejo, la juĝejo kaj la lernejo estas tri ĝiaj ĉefaj institucioj. Kiam Esperantistoj revas pri oficialigo de Esperanto, pri deviga instruado en la lernejoj, kaj pri ĝia akceptigo kiel baza lingvo de la internacia juro, ili transprenas kaj kultivas modernismajn idealojn.

Modernismo estas la plej efika mobilizforto kiun la homoj ĝis nun malkovris. Ĝi alprenas plej diversajn formojn — naciismo, komunismo, merkatiismo, ĉiuspecaj religiaj fundamentiismoj, ktp. Ankaŭ en la Esperanto-komunumo ĝi sukcesis kaj daŭre sukcesas mobilizati, kvankam evidente je tute alia skalo ol la grandaj ismoj de nia epoko.

En tiu mobilizado por idealo, troviĝas liberigaj kaj malliberigaj potencialoj. Mi ne bezonas ekzempli. Konkrete, en la kazo de Esperanto, multaj homoj trovis ion anim-altigan, ag-instigan, mem-progresigan en la konvinko ke la universaligo de Esperanto helpas ordigi la mondon. Sed ĉiuj modernismoj estas samtempe disvastigemaj, prozelitemaj, bezonantaj ekspansion por vivteni sin. Por varti modernisman movadon oni devas montri progreson, ĉu iluzion, ĉu realan.

Ekde la 60aj jaroj (kaj kelkaze eĉ pli frue) disvastigis duboj pri la ebleco kaj indeco de la progreso kiun promesis plej diversaj modernismoj. En la Esperanto-komunumo tio esprimiĝis i.a. per la Deklaracio de Tireso, kiu alvokis al batalo kontraŭ “lingva imperiismo”, t.e. la modernisma lingvopolitiko kiun la okcidentaj ŝtatoj sukcese disvastigis pere de konkerado, koloniado kaj komerco. Inter la nuntempaj konsekvencoj de tiu politiko troviĝas i.a. la akceliĝanta perdo de lingva diverseco kaj la hegemonio de Europaj lingvoj en la lernejoj kaj komercaj sistemoj de la mondo.

La Manifesto de Raŭmo¹ turnis tiun

¹ La tekston trovu en nia juli-aŭgusta numero — ■

postmodernan kritikon kontraŭ la modernismon de la Esperantistoj mem. Nun la celtabuloj estis la hierarkiaj strukturoj de la movado, la revoj pri “desupra” akceptigo de Esperanto, la troiga propagando (celita kaj eksteren kaj internen), la ĵaluzo al la Angla, la neglektado (fare de la pli multaj movadanoj) de indiĝenaj kulturaj tradicioj. Freŝa, kvankam ne facila vento; kaj historie necesa, ĉar sekvanta la nerezisteblan tajdon de postmoderna revalorigado.

2. Raŭmo kaj modernismo

Manifestoj estas tamen danĝeraj iloj. Vortigante kritikon kaj vizion, ili riskas liveri bazon por novaj dogmoj. La modernismo estas teksita per tekstoj, kaj defendas sin per ili.

Tiel povis okazi ke Raŭmo iĝis la bazo de alternativa modernismo, plia konkuranto por Esperantistaj identecoj kaj lojalecoj apud la jam tradiciaj ideologioj. Mi esence samopinias kun Gerorgo Kamaĉo: ke temas pri speco de naciismo, aŭ “etnismo” se oni preferas malpli ŝarĝitan terminon.

Naciismo/etnismo povas esti tre konstrua forto; kaj nur songas tiuj homoj kiuj profetas ĝian malaperon el la moderna mondo. Komprenible ĝuste ĝi pelis la evoluigon de la modernaj lingvoj (kaj inverse, laŭ Benedict Anderson), kaj pro tio ĝi hejmas iom nature en lingve difinita komunumo.

Sed eblas vidi ankoraŭ pli profundan kaŭzon de ĝia elkresko el Raŭmo. La Manifesto kritikis la psikan dependecon de la movadaj modernistoj je la ne-Esperantista mondo, kaj ĉefe ties registancoj. Unu logika sekvo, do, estas turni sin al la konstruado de propra reg-sistemo, same kiel oni faris dum la senkoloniiga aŭ naciliberiga periodo en multaj landoj. Por tiu projekto necesas unue ideologio, due gvidanta elito, trie reprezentaj instancoj kiuj povas gajni popolan subtenon. Nenio vere nova en ĉi tiu projekto, escepte de la fakto ke la Esperantistoj ne konsistigas etnon...

Sed ankaŭ tio ne novas. En la landoj de Ameriko oni daŭre penas konstrui naciajn identecojn kapablajn kunigi la plej diversajn sociajn grupojn. En Kebekio, ekzemple, la naciismo disevoluis

dudirekte: unuflanke al etnocentra speco, kultanta “puran Kebekiecon” kaj rilatanta kun suspekto al ĉiuj aliaj etnoj; aliflanke al “civita” speco, kultanta toleremon surbaze de komunaj normoj, nur parte hereditaj el la indiĝena Kebekia kulturo. La limoj inter tiuj du naciismoj kelkfoje klaras, kelkfoje ne; sed gravas ĉi-kune la fakto ke naciismo ne bezonas por ĉiam la etnajn radikojn el kiuj ĝi kreskis. Ĝuste tiel estas imagebla speco de Esperanta naciismo, pli civite ol etne orientita.

Por nia diskuto estas precipe interesa la demando ĉu tia Esperanto-“naciismo” pliigos la ŝancojn ke per la lingvo diriĝos io “kulture originala kaj internacie valoraj”? Tiu frazo jam ŝajnas aludi la kreaĵon laboron de iu klera elito; oni subkomprenas ke la ordinaraj Esperanto-renkontiĝoj, la revuoj kaj kongresoj, la populara literaturo, ne povas esti originalaj kaj internacie valoraj en tiu senco. Se oni akceptas tiun ideon, do la Esperanto-“naciismo” ja povus ludi kulturkonstruan rolon, ĉar ne-ekstremaj naciismoj ĝenerale vartas indiĝenajn tradiciojn, artistojn kaj publikojn. Komprenible, ekstrema naciismo, forturnita de eksteraj influoj kaj individua eksperimentado, bremsas ĉian kulturen kreemon, sed pri tio evidente ne povas temi.

Aliflanke, por ludi tian rolon, la Esperanto-naciismo deyas unue allogi artistojn kaj publikon. Ĉu ĝi povos sukcesii tiurilate, mi vere dubas. Verŝajne nur malgranda parto de la homoj kiuj lernas Esperanton ĝis parolado kaj legado, sentos sin allogata de la naciisma idealo. Etnaj naciismoj ĉerpas el longa historio, el la posedado kaj prizorgado de la tero, el la ekzisto de ekonomia bazo, el sia plimulteco sur iu teritorio. La Esperanto-naciismo posedas nenion el tiu fundamento; ĝi havas nur lingvon kaj ideojn. Tiuj ĉi ja sufiĉas por allogi kelkajn intelektulojn kaj idealistojn, sed ne por la dinamika kultura movado pri kiu eble revas ĝiaj gvidantoj...

Krome, la naciismo kulturen kostonojn. La solidariĝon kun samnacionoj oni pagas per distancigo disde alinacionoj. La rajtojn en nacie bazita demokratio oni pagas per marĝenigo de aliaj identecoj. Ŝajnas al mi ke Esperanto-kaze tia distancigo kaj tia marĝenigo

konsistigas tro grandan prezon. La Raŭma manifesto parolis pri konflikto inter egoo kaj superego; sed simila konflikto ne eviteblas, se la tro ekstere orientitan identecon oni anstataŭigas per tro interne orientita. Lingvo kreita por transi diferencojn ne facile portos ideologion kiu insistas ĝuste pri ĝia diferenciga efiko.

Sed ĉio ĉi ne estis nepra konsekvenco de Raŭmo. Ĝi prezentas unu eblan evoluvojon, kiun iuj ŝatus kredigi nepra. Se ni revenos al la komenckpunkto, ni trovos alternativojn.

3. Raŭmo kaj postmodernismo

Unu alternativo estas la postmodernisma. Rimarku ke sociologoj nuntempe distingas inter “postmoderno”, la nuna periodo en kiu la bazaj premisoj kaj imagoj de la modernismo perdis sian netuŝeblecon, kaj “postmodernismo”, la ideologio kiu emfaze malakceptas tiujn premsiojn kaj imagojn. Postmodernisma Esperantisto asertus ke nenio komunas nek devus komuni inter la parolantoj de Esperanto; eĉ la lingvon mem ĉiu grupo rajtus adapti al siaj bezonoj kaj ŝatoj; se iuj volas okupiĝi pri verbado, aliaj pri scienco, kaj aliaj pri kolektado de poŝtmarkoj, ili kvazaŭ vivas en apartaj mondoj, kiujn kunigi sub unu idea aŭ organiza tegmento ne eblas kaj ne indas.

Postmodernistoj rilatas kritike al la ŝtataj strukturoj, sed ironias ankaŭ pri ĉiuj provoj ilin malmunti, vidante en ĉiu tia organizita movado la semojn de nova hierarkio, nova hegemonio. Logike, do, postmodernistoj evitas mem stariĝi kaj gvidi organizaĵojn; ili estas ĝisfundaj individuistoj, kaj kutime fieras ĝuste pri tiu neligiteco, nesubiĝemo al kolektivaj iluzioj.

Ĉu eblas ke konsekvencaj postmodernistoj subskribus alvokojn por “io kulture originala kaj internacie valora”? Mi opinias ke ne. En tiaj taksemaj vortoj kiaj “originala” kaj “valora” postmodernistoj flarus modernismajn pretendojn, ian subtekstan kredon je absoluteco. Estas nedubinde ke la postmodernismo mem povas inspiri originalajn artverkojn, kvankam ili malofte alireblas por granda publiko. Sed la ideo ke eblas rangigi kulturajojn, taksante ilian originalecon kaj “internacian” valoron, plene fremdas al la postmodernis-

ma pensado.

Modernismo kaj postmodernismo prezentas du aspektojn de la Raŭma ideo. Ĉu ekzistas plia? Mi argumentos ke jes; kaj ke tiu tria dimensio plej multe kaj plej fruktodone konformas al la dinamiko de la Esperanto-komunumo.

4. Raŭmo kaj transmodernismo

Rekonante la nesufiĉon kaj negativajn sekvojn de la modernismo, la Raŭma Manifesto serĉis “pli koheran” motivigon de ĉies Esperantisteco. En tiu integriga idealo mi vidas ĝian kernan pozitivan valoron. Percepta estas ankaŭ ĝia listigo de la specife integrigaj valoroj de Esperanto: — lingva/propeudentika (integrigo per individua plurlingveco), — interpersona (integrigo per senpera komunikado inter homoj), — interreta/internacia (integrigo per egaleca komunikado inter grupoj), kaj — aŭtonoma (integrigo per komuna tradicio).

Temas efektive pri kvar malsamaj sistem-nivejoj en la funkciado de Esperanto. La Manifesto do rigardeblas kiel avangarda provo rekonii ĉiujn kiel esencajn. Ne sufiĉas prediki pri la bono de “internacia” lingvo, ne sufiĉas uzi ĝin en amika rondo, ne sufiĉas sin klerigi per ĝi aŭ malkovri novan identecon en la kulturo kiun ĝi peras: necesas ĉio kune. La Esperanta kulturo kaj la Esperantista identeco estas la sumo de tiuj agadoj kaj valoroj: ni do akceptu ilin kiel niajn.

Jen la Raŭma interpreto kiun mi trovas plej valora: saniga alvoko al reintegrigo. Sekve, anstataŭ fabriki kaj priteorii la disduigojn kiujn abunde disŝprucis aliaj interpretoj, tiu tria branĉo de la Raŭma arbo evitas etikedeojn entute. Kie Walter Zelazny vidas kontraŭecojn, ĝi vidas kompletigajn variaĵojn: Prago kompletigas Raŭmon, horizontalaj strukturoj kompletigas vertikalajn, elita kulturo kompletigas la vulgaran. Komprenoble troviĝas streĉoj kaj malkonsentoj, kiel en ĉiuj homaj kulturoj. Sed el tiuj malkonsentoj ĝi ne penas konstrui vastan teorion pri pravo kaj malpravo.

Pri unu aspekto, aparte, Raŭmo ŝajnas kompletigenda. Verkante en Esperanto por Esperantistoj, la aŭtoroj sub-

konscie ellasis el konsidero la ceteran homaron. Sed tiuj homoj ne fremdas al ni, kvazaŭ la Esperantistoj estus izolita tribo vivanta per la propraj rimedoj sur la bordoj de tropika rivero. Multrilate kaj multkiale ili estas niaj samsortanoj.

Tial la reintegriga klopodo devas inkluzivi la detruon de la psikaj kaj komunikaj baroj kiujn la Esperanto-modernismo konstruis ĉirkaŭ nia komunumo.

Troas jam nia krokodilofobio! Ni devas lerni naĝi en tiuj akvoj, malpli mortminacaj ol niaj fantazioj pentris ilin... Raŭmo bedaŭrinde ne helpis tiurilate; mi esperas ke Prago faris almenaŭ paŝeton en la ĝusta direkto.

Ĉi tiun reintegrigan klopodon mi nomis “transmoderno”. Ismo ĝi ne vere estas; pli ĝuste ado. Homoj ne facile vidas tutejn, kaj la moderna epoko, tiom bazita sur la analizado de partoj, igis tion eĉ pli malfacila.

Tamen, se oni rigardas al la plej malnovaj filozofioj kaj disciplinoj, tiuj kiuj ne adaptiĝis al la postuloj de modernisma regado, oni trovas ke ege antikvas la strebo percepti tutejn kaj agi laŭ tiu percepto.

Se la Esperantistoj sukcesos diri ion “kulture originalan kaj internacie valoran”, laŭ mi temos pri kontribuo al tiu centjarmila civiliza projekto: kompreni tutece la rilaton de homo, kulturo, kaj mondo, kaj surbaze de tiu kompreno lerni pli bone vivi.

Ŝajnas al mi ke kun ĉiuj niaj mankoj kaj eraroj, ni jam diras ion aŭskultindan. Retrovante la originalan inspiron de Raŭmo, ni eble sukcesos diri ankoraŭ pli. □

(2) Prelego de Ralph Harry dum la Zamenhof-Vespero 1999

Mi persone neniam renkontis D-ron Zamenhofon, ĉar li mortis kelkajn semajnojn post mia naskiĝo en 1917. Sed ni povas legi kiel Zamenhof alfrontis la dudekan jarcenton en 1899, kaj el lia karaktero oni povas diveni kiel li interpretus la nunan tutmondan situacion kaj la eblan rolon de Esperanto en la tutmondiginta tero de hodiaŭ.

Mi supozas ke la Esperantistoj en Rusio, Germanio, Anglio kaj Francio

rigardis antaŭen en la novan jarcenton kun speciala espero pri la estonteco, same kiel ni faras ĉi tiun monaton. La mondo ne estis tute paca — la Britoj jus militis en Afriko kontraŭ la koloniistoj de Nederlanda deveno. Estis tamen indikoj ke la popoloj de nia mondo deziras forigi la militajn hororojn de la 19-a kaj 18-a jarcentoj. Oni fondis internacian komitaton de Ruĝa Kruco, kaj internacian kortumon kaj kodigis la internacian juron pri la milito.

Zamenhof daŭre penis transigi respondecon pri la lingvo al la miloj kiuj komencis la lernadon kaj uzadon, sen atendi la organizon de Esperanta “popolo” de kelkmilionoj da parolantoj. Ĝis 1900 Esperanto estis uzata ĉefe en korespondado. Nur en Rusio oni utiligadis la parolatan lingvon, sed certe Zamenhof revis pri vere internaciaj kunvenoj.

Tamen restis minacoj al la movado pro la diversaj vidpunktoj de tiuj kiuj kredis ke la internacia lingvo estas nur lingvo, ne ilo por promocii au ebligi la pacon. Eĉ kvankam li ne antaŭvidis ĉiujn danĝerojn en 1899, Zamenhof plugis sian sulkon konstante dum la lastaj 17 jaroj de sia vivo. La Universalsalaj Kongresoj regule okazis ĝis 1914. Hodler kaj liaj amikoj organizis UNIVERSALAN ESPERANTO-ASOCION kun ĝia reto de delegitoj. La laborado de la Svisaj Esperantistoj dum la Unua Mondmilito elmontris la gravan helpon eblan fare de internacia organizaĵo kun reprezentantoj en multaj landoj kaj uzantaj intemacian lingvon.

Sed eĉ la komenco de tiu milito estis grava bato al Zamenhof. Dume, oni diskutis en la movado la koncepton de “neŭtraleco”, ofte almetita al la lingvo. Plej simple “neŭtrala” signifas “ne favoranta unu el la landoj en konflikto” sed en periodo de interŝtata konkurenco kaj konflikto oni spertis ke eĉ lernado kaj uzado de intemacia lingvo povas esti interpretata kiel “ne-neŭtrala” konduto, eĉ perfido — ke Esperanto estas “danĝera lingvo”. Zamenhof restis ekster la batalo same kiel li tenis sian subtenon al la ideo de Hebrea Ŝtato.

Esperanto inter la Mondmilitoj
Post la Unua Mondmilito, la Esperanto-Movado havis novan oportunon kaj

defion — la kreon de LIGO DE NACIOJ, kaj la eblon ke la nova fenomeno agnoskos kaj helpas Esperanton akiri rekonon en la lernejoj eĉ se la LIGO mem ne uzos nian lingvon en siaj kunveno. Nur kelkajn jarojn post la morto de Zamenhof liaj posteuloj kunlaboris bone por profiti el la okazo kiun prezentis la LIGO, kaj nur nacisma egoismo malebligis gravan antaŭenpaŝon.

Mi ne scias pri iu atesto ke Zamenhof antaŭvidis la danĝeron de la totalismaj faŝistaj reĝimoj de la 30aj ĝis la 80-aj jaroj. La historio de la suferoj de Esperantaj martiroj en Germanio, Italio, Hispanio, kaj Japanio, estas detale rakontitaj en *Esperanto — La Danĝera Lingvo*. Oni diras kelkfoje ke “la sango de la martiroj estas la semo de la Eklezio”, sed en tiu periodo ŝajnis ke la diktatoroj faris preskaŭ mortigan frapon al la Movado. Estis kelkaj Esperantistoj kiuj serĉis sekurecon per provizo de informaj iloj al la ŝtataj respondeculoj. Mi ne kredas ke Zamenhof aprobus tian interpreton de “neutraleco”.

Dilemoj de la Mondo Post 1945

D-ro Zamenhof estus kompreninta la dilemon de la Esperanto-Movado post la Dua Mondmilito. En la nova UNU-IGINTAJ NACIOJ, la Grandaj Potencoj certigis ke iliaj propraj lingvoj fariĝis oficialaj, ne nur la Angla kaj la Franca sed ankaŭ la Ĉina la Rusa, kaj la Hispana. Nia movado ne sukcesis persvadi la mondon ke la oficialigo de pluraj lingvoj aldonas al la kosto, kaj pli grandigas la diskriminacion. La movada strategio de la Movado estis: vendi Esperanton al UNESKO kiel lingvon de edukado, scienco kaj kulturo. Ni havis kelkajn sukcesojn, sed la multego de sendependaj ŝtatoj, feraj pri siaj propraj lingvoj, kaj suspektaj pri la lingvoj de la koloniistaj ŝtatoj, estigis problemon.

Novaj Eblecoj

Sed ni estas nun je la fino de la 20-a jarcento, kaj ni devas demandi nin: “Kion pensus Zamenhof pri la defioj kaj la eblecoj de la 21-a jarcento?”

Li komprenus la neceson ke la pilotoj de la gigantaj aviadiloj havu komunan lingvon kun la organizantoj kaj administrantoj de sekureco sur la tero.

Zamenhof ja konis la telefonon kaj telegrafon, kaj la kinon. Sed eble plej interesus lin la komputilo kaj INTERRETO.

Kaj liaj finaj vortoj sendube substrekus ke Esperanto estas “nenies propraĵo” nek en rilato materiala, nek en rilato morala. Li aprobus Raŭmismon, la Deklaracion de Prago, kaj la novan Esperantan “civiton”.

Mi legos, fine, la celaron de la Esperanta Civito, kiel ĝi aperas en Artikolo 2 de “Projekto de Konstitucia Ĉarto de la Esperanta Civito”, eldonita en *Literatura Foiro*, en oktobro 1999:

1. Konforme al la tradicioj establitaj en Bulonjo-ĉe-Marco en aŭgusto 1905, la Civito celas firmigi la rilatojn inter la Esperantistoj kiuj sentas sin apartenantaj al senŝtata diaspora lingva grupo, laŭ la difino en art.1.5 de Universala Deklaracio de la Lingvaj Rajtoj, proklamita en Barcelono la 6-an de junio 1996.
2. La firmigo de tiuj rilatoj realiĝas per la difino kaj pacama evoluigo de komuna kondukmodo, transnacia kulturo kaj kolektiva identeco.
3. Ne estante ŝtato, la Civito ne avidas politikan kaj ekonomian potencon, sed celas klerigan, edukan, kulturalan evoluon, en komprenemo kaj toleremo rilate al la diversaj pensoskoloj al kiuj persone aliĝas la civitanoj. Teknologijaj kaj financaj rimedoj devas helpi la liberan kaj demokratran evoluon de la civitanoj. [Ekstraktita el *Telopeo*] □

(3) LA ESPERANTA KULTURO

de Marcel Leereveld

La unua kaj precipa tasko de Esperanto estas funkcii kiel (relative) facila kaj neŭtrala kaj fidebla interkomunikilo inter homoj elnaskiĝe parolantaj malsamajn lingvojn. En nia entuziasmo por la lingvo kaj por ĝiaj adeptoj ni neniam forgesu tiun gravan precipan taskon, la ekzistorajton de Esperanto.

Tiuj precipeco signifas ke ĉiu alia uzo de nia lingvo estas nur flankajo, kiom ajn interesa kaj valora. Tiuj flankajtoj estas bonŝancaj “kromproduktaĵoj”. Se

persono studas kaj uzas Esperanton nur por tiuj flankaĵoj kaj ne por la precipa tasko, ni nomas lin/ŝin Esperantoparolanto, ne Esperantisto.

Formante Esperanton, Zamenhof zorgis ke la lingvo uzeblu ankaŭ por la flankokupoj. Tio vidigas speciale en la beletro. Kaj kvankam poezio pli facile kreas en multaj lingvoj, la Esperanta poezio povas belegi, sed nur bezonas pli grandan talenton ol por krei etnan poezion. Tamen ni ne forgesu ke beletro ne estas la celo precipa de Esperanto.

Alia flankokupo estas uzi Esperanton por klarigi, kaj eterne pridiskuti, gramatikajn kaj semantikajn lingvajn fenomenojn, pere de Esperanto en kiu tiuj fenomenoj devas ofte vidati plej klare. Sed, same kiel la beletro, tiu flankajo ne estas la precipa tasko, kvankam helpa al la ĝusta kaj fidebla uzo por tiu precipa tasko, la rekta interkomunikado inter la tutmonda homaro.

Tria flankafero estas uzi Esperanton por sia enfamilia vivo, do kiel unuan lingvon, ofte elnaskiĝe. Nek ĝi estis nek estu ĉefcelo, ĉar ĝi tiam, se ĝenerale akceptita, detruus la etnajn lingvojn.

Alia flankajo estas la kreado aŭ la kreiĝo de speciala Esperanta kulturo. Ankaŭ ĉi tie temas ne pri Esperantismo, sed simple pri Esperanto-uzado. Kompreneble, multaj kiuj uzas Esperanton por unu el la flankokupoj estas krome veraj Esperantistoj, homoj kiuj studas, uzas, instruas kaj propagandas la lingvon por ĝia precipa celo, simple esti fidebla interkomunikilo interpopola.

Se oni deziras krei kaj praktiki specialan Esperanto-kulturon, ĝi povas formiĝi duspeca: aŭ miksaĵo de diversaj mondaj kulturoj, kvazaŭ infuzajo el la veraj kultureroj, aŭ kombinaĵo de kutimoj kreskiĝintaj en internaciaj kun-

venoj Esperantistaj kaj de Esperantaj lingvouzaĵoj. En la unua kazo ni imitas la nun ĝeneralan tendencen ekonomie, kaj por tio socie, unuformigi la populajn interesojn al t.n. sennacieca globismo ("globalizado"). Se Esperanto-parolanto, aŭ eĉ Esperantisto, deziras preni parton en tiu flankokupo, nu iliero [= li aŭ ŝi] faru tion. En la dua kazo la rezulto estos trogravigo de nekulturecaj manioj interesaj nur por interligi Esperantistojn pere de supraĵaj kaj tute sektismaj uzaĵoj (i.a. la uzo de nenecesaj sentimentalaj vortoj kiaj "etosoj" kaj "korifeo"). Bedaŭrinde temas precipe pri ĉi tiaj senvaloraĵoj, se oni parolas pri Esperanto-kulturo. Anstataŭ propagandi Esperanton, oni tiel kreas du kampojn: la "bonaj" Esperantistoj kun sia propra "kulturo" kaj la "malbona" resto havanta alian kulturon.

En nia propagando por Esperanto ni ĉiam substreku la precipan taskon, la (relativajn) facilecon kaj neŭtralecon kaj fideblecon. Ne malutilas menciadi ankaŭ kelkajn flankajn celojn, kiel ĝian helpon lerni sian kaj aliajn lingvojn, ĝian beletrun-povon, ĝian helpon en la scienca lingvismo, ĝia helpon krei pacajn ideojn kaj praktikon, ĝian malmultekostan helpon en komerco, ĝian helpon scii pri aliaj kulturoj.

Mia fina averto temas pri la "Esperanta kulturo". Ĉar ĝi estas senvalora, eĉ kelkaspekte malamika, por la ne-Esperantista mondo, ni neniam menciui ĝin, almenaŭ ne kiel seriozajn, ĉar ĝia propagando estos negativa. Tio validas same por la miksaĵ-kulturo, kiu, ĝuste, kolerigus multajn etnoamantajn homojn, kiel por la manieraĵoj Esperantulaj laŭdataj en kelkaj rondoj niaj kiel "Esperanta kulturo". La ekstera mondo nur mokus nin pri niaj valtdisniaĵoj¹. □

¹Walt-Disney-aĵoj — ■

Viro estas en kino. Antaŭe, li surprizate rimarkas virinon kiu sidas kun granda hundo. Eĉ pli surprize, la hundo ŝajne komprenas la dramatan filmon; la hundo sidas rekte kaj vostumas dum la feliĉaj partoj, sed mallevas la kapon kaj sidas senmove dum la malfeliĉaj partoj.

Kiam la filmo finiĝas la viro iĝas ege

scivolema. Li enketas de la virino pri la hundo:


"Pardonu min, sinjorino, sed ŝajnis al mi ke la hundo ege ĝuis la filmon. Mi tre surpriziĝas pri tio."

"Jes," respondas la virino, "Ankaŭ mi ege surpriziĝas! Li tre malamamis la libron!"

[El Eventoj]

JUBILEO DE ANTARKTIKA ESPERANTO-ASOCIO

raportas Odlo Bokserp



P. Blankapunktaj
Flugiloj

Antarktika Esperanto-Asocio festis sian 179-jaran jubileon je la 2a de septembro ĉijare. Ĉefprelegis al la speciala kunveno P. Blankapunktaj

Flugiloj (67), honora

prezidanto de AEA. Post enkondukaj forsalutaj vortetoj al nia kolega asocio AEA de Aŭstralio, kiu de nove estas amika asocio¹, P. Flugiloj anoncis novan tribunalproceson kontraŭ iu Angla-Usona eldonisto kiu uzas la nomon Pingvenaj Libroj por siaj eldonataj verkoj.

P. Flugiloj, kies konantoj lin moknomas "Fiŝkap", fervore kromanoncis la komencon de nova Antarktika libroserio nomata Imperi-Pingvenaj libroj,

kiu estos vendata en ĉiuj neĝdomoj ne nur en Antarktiko sed ankaŭ en Suda Afriko kaj sur la Insulo de Pingvenoj en Aŭstralio.² Oni

planas aperigi la unuan libron de tiu serio tuj kiam nia eminenta Pingvena serĉisto P. Fiŝfuĝanto trovos Antarktikan arbon de kiu eblos preni foliojn



Turisto vizitonta
la kunvenon

¹Finigis per ekstertribunala interakordo la proceso de la Antarktika Esperanto-Asocio kontraŭ la Aŭstralia Asocio, kiu misplagiatis la komencliterojn de la Antarktika Esperanto-Asocio. La Antarktika AEA permesos ke la Aŭstralia Asocio plu uzu tiujn komencliterojn, kontraŭ ĉiujara pago de 30214 fiŝoj.

²Sciantoj scias ke tiu insulo nomiĝis honore al la fama monografio tradukita en 1908 el la Pingvena en la Francan lingvon de la fama etnografo Jacques-Anatole-François Thibault, kun la titolo

por presi sur ilin la libron.

Kompreneble, profitoj de la eldon-entrepreno helpas diskonigi Esperanton inter la pingvenoj de Antarktiko, kaj por propagandi inter la multnombraj gastlaborantoj en Antarktiko el ĉiuj aliaj ses kontinentoj. Parto de la profitoj ankaŭ estos donacita al David Attenborough (75), la fondinto de la **Asocio de Pingvenaj Esperantistoj**³, kiu estis renomita AEA en la jaro 1314.⁴

Intertempe la junaj pingvenidoj de la Unua Naĝklaso pretigos inkon por la presado, per dispremado de sepioj kiujn oni es-



La inkopreparontoj

peras kapti en la oceano proksime al la kongresejo. Enorma klakado deflugiloj bonvenigis la anoncojn de la Prezidanto de AEA, kaj tuj post la prelego P. Fuŝflugprovulo proponis ke P. Flugiloj estu elektita Prezidanto de UEA⁵ post eventuala elposteniĝo de la aktuala eksprezidanto de nia kolega AEA.

Tiel finiĝis la Laborkunsido de la jubilea kunveno. Sekvis la distra vespero, dum kiu plej aplaŭdita estis la fiŝgluta konkurso. Gajnis la oran pokalon P. Helikmarŝulo (31), kiu tuj proponis la pokalon al la junaj pingvenidoj por enteni la preparotan inkon.

(Tajpita, ĉar mia komputilo rifuzas

Insulo de Pingvenoj.


³(Reaktoro, bonvolu ŝanĝi ĉi tiun nomon al gotika alfabeto. -- OB)

⁴T.e., la Asocio estis renomita en tiu jaro. David Attenborough fariĝis renoma nur kelkajn jarcentojn poste. Li fariĝis honora pingveno en 1982.

⁵La Universala Esperantista-Angilaro.

funkcii en la malvarmo inter la pingvenoj: -- 08)

Movu la foton al la maldekstra kolumno p.26, apud la mencio pri la Helikmarŝulo



LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Ron Gates, Wangarang, MSF 2001, Armidale NSW 2350.

☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.

rgates@metz.une.edu.au

Vicprezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

jennybishop@education.monash.edu.au

Sekretario: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

☎ (03) 9807 8589.

minglis@netspace.net.au

Vickasisto: Dianne Lukes, c/o Post Office, Meringandan Qld 4352.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

Prezidanto: Bradley McDonald, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.

neelam@voyager.co.nz

Sekretario: Howard Gravatt PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membro: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la konto ael-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2000 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2000 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302. Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

A NEW CONTEST

-us or not-us?

The success of our translation contest in the March-April issue has inspired us to bring out still another contest, this time rather easier and, we hope instructive as well as posing a fairly simple challenge.

The contest consists of twenty English sentences to be translated into Esperanto. The sentences require you to choose between using the ordinary verb endings (*-as*, *-is*, *-os*; or *-u*) or the ending *us* for each verb. The contest was designed and written by Marcel Leereveld.

Every person who submits a *correct* translation of all twenty will receive a special book prize, to be chosen by the editor. The judges will be Marcel Leereveld and Donald Broadribb. Send your entries by e-mail to: donaldbroadribb@mac.com, or by ordinary mail to Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia.

[Please note: in the following texts, material between square brackets is explanatory, and not to be translated.]

1. I shall go tomorrow, if I feel well. [I may feel well.]
2. He has surely arrived in time, if the plane has had no delay. [It may not have.]
3. If they can make up their minds [they may be able to], we know what to expect.
4. I would go tomorrow, if I had the money. [But I don't.]
5. I would have left earlier, if I had known the time. [But I didn't.]
6. If I had known that [but I didn't], I could have helped her.
7. I would go tomorrow, if I were you. [But I'm not.]
8. If he had been ill [but he wasn't], I would have come. [So I didn't.]
9. I would go now and apologize. [If I were you, i.e. you ought to go now.]
10. You should have come, if you were not ill. [But you were.]
11. You should come to the party, it will be terrific.
12. You would not do that to me [= certainly not], would you?
13. Had he come [=if he had come, but he hasn't], I would have left.
14. If I were you, you'd better accept it.
15. If he did come back [he might], I would not let him in.
16. If he comes back, I shall tell him to leave.
17. If you weren't ill [but you are], I would have refused entry.
18. Why would you do that? [= why do you want to do that]
19. We should be home soon.

20. would you mind sending her a bouquet of flowers? *All entries must be received by 6 pm August 18, 2000.*

ENGLISH?

by Vera Payne

Esperantists (professionally hopeful!) must admit that English has become the de facto international language. Soon, it will be spoken almost everywhere in the world. For the most part, badly. Even professional Australian journalists have not fathomed the mysteries of “who” and “whom”, fall into the trap of “different to”, and use expressions like “have given it to you and I”. On radio we hear bungles like “burgle-ry” and “nucular”, and we have now become a nation of “Ostrayans”. The possessive apostrophe is fast becoming archaic, and indeed, thanks to modern technology, punctuation itself is on the way out.

We all know of the Russian computer which translated “the spirit is willing but the flesh is weak” as “the vodka is good but the meat has gone bad”, and of President Jimmy Carter’s interpreter, who told the bemused Poles that America wanted to have carnal knowledge of them, when he meant to indicate that an intimate relationship between the two countries was desired.

A freshly painted sign on a garage near me advertised “curteus service” for several weeks.

What, then, can we expect from countries where English is not their first language? Here are a few examples:

Sign posts spotted around the world:

In a Nairobi restaurant: customers who find our waitresses rude ought to see the manager.

On the grounds of a private school: No trespassing without permission. On an Athi river highway: Take notice: when this sign is under water, this road is impassable.

On a poster at Kencom: Are you an adult that cannot read? If so, we can help.

In a city restaurant: Open seven days a week and weekends.

One of the Mathare buildings: Mental health prevention centre.

A sign seen on an automatic restroom hand dryer: Do not activate with wet hands.

In a Pumwani maternity ward: No children allowed.

In a cemetery: Persons are prohibited from picking flowers from any but their own graves.

Sign in Japanese public bath: Foreign guests are requested not to pull cock in tub.

Sign in men's rest room in Japan: to stop leak turn cock to the right.

Tokyo hotel's rules and regulations: Guests are requested not to smoke or do other disgusting behaviours in bed.

Hotel notice, Tokyo: Is forbidden to steal hotel towels please. If you are not a person to do such a thing is please not to read notis.

On the menu of a Swiss restaurant: our wines leave you nothing to hope for.

In a Tokyo bar: Special cocktails for the ladies with nuts.

In a Bangkok temple: It is forbidden to enter a woman even a foreigner if dressed as a man.

Hotel room notice, Chiang-Mai, Thailand: Please do not bring solicitors into your room.

Hotel brochure, Italy: This hotel is renowned for its peace and solitude. In fact, crowds from all over the world flock here to enjoy its solitude.

Hotel lobby, Bucharest: The lift is being fixed for the next day. During that time we regret that you will be unbearable.

Hotel elevator, Paris: please leave your values at the front desk.

Hotel, Yugoslavia: The flattening of underwear with pleasure is the job of the chambermaid.

Hotel, Japan: You are invited to take advantage of the chambermaid.

In the lobby of a Moscow hotel across from a Russian Orthodox monastery: You are welcome to visit the cemetery where famous Russian and Soviet composers, artists, and writers are buried daily except Thursday.

Hotel catering to skiers, Austria: Not to perambulate the corridors in the hours of repose in the boots of ascension.

Taken from a menu, Poland: Salad a firm's own make; limpid red beet soup with cheesy dumplings in the form of a finger; roasted duck let loose; beef rashers beaten up in the country people's fashion.

Supermarket, Hong Kong: for your convenience, we recommend courteous, efficient self-service.

Dry cleaner's, Bangkok: drop your trousers here for the best results.

From the Soviet Weekly: There will be a Moscow exhibition of arts by 15,000 Soviet Republic painters and sculptors. These were executed over the past two years.

In an East African newspaper: A new swimming pool is rapidly taking shape since the contractors have thrown in the bulk of their workers.

Hotel, Vienna: In case of fire, do your utmost to alarm the hotel porter.

A sign posted in Germany's Black Forest: It is strictly forbidden on our Black Forest camping site that people of different sex, for instance, men and women, live together in one tent unless they are married with each other for this purpose.

Hotel, Zurich: Because of the impropriety of entertaining guests of the opposite sex in the bedroom, it is suggested that the lobby be used for this purpose.

An advertisement by a Hong Kong dentist: Teeth extracted by the latest methodists.

A laundry in Rome: Ladies, leave your clothes here and spend the afternoon having a good time.

Tourist agency, Czechoslovakia: Take one of our horse-driven city tours. We guarantee no miscarriages.

Advertisement for donkey rides, Thailand: Would you like to ride on your own ass?

In the window on a Swedish furrier: Fur coats made for ladies from their own skin.

The box of a clockwork toy made in Hong Kong: Guaranteed to work throughout its useful life.

In a Swiss mountain inn: Special today — no ice-cream.

Airline ticket office, Copenhagen: We take your bags and send them in all directions.

On the door of a Moscow hotel room: If this is your first visit to the USSR, you are welcome to it.

Cocktail lounge, Norway: Ladies are requested not to have children in the bar.

At a Budapest zoo: Please do not feed the animals. If you have any suitable food, give it to the guard on duty.

Doctor's office, Rome: Specialist in women and other diseases.

Hotel, Acapulco: The manager has personally passed all the water served here.

Information booklet about using a hotel air conditioner, Japan: Cooles and heates: if you want just condition of warm air in your room, please control yourself.

Car rental brochure, Tokyo: When passenger of foot heave in sight, tootle the horn. Trumpet him melodiously at first, but if he still obstacles your passage then tootle him with vigor.

Esperanto lessons by correspondence are available at various levels. For details contact Hazel Green at 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, e-mail hazgreen@tmba.design.net.au.

Details are also available on the Internet at <http://tmba.design.net.au/hazgreen/>